der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

23. Jahrgang | Nr. 143 (3/1987) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

La jubileo jam efikas

Ĝenerale jubileoj donas eblecon por atentigi pri eferoj, aventoj, eminentaj elstaruloj, pri kiuj oni ĝenerale eble ne tro okupiĝus. Sed, ĉu estas utiligebla ĉi-tiu ebleco, ne nur dependas de la jubileo sed, antaŭ ĉio, ĉu la jubileaĵo entute jam ĝuas certan renomon, intereson aŭ prestiĝon. Sendube, en GDR la Esperanto-movado ne estas komparebla laŭ forteco, kun la hungara, bulgara aŭ pola. La tre limigitaj homaj fortoj de nia asocio (ekz. nur 3 pagitaj oficistoj) ne permesas iniciati eksterordinarajn kromajn aranĝojn aŭ aferojn. Tio jam limigas. Aldoniĝas al tio nia konvinko, ke stabila asocio kun neskuita evoluo estas eble ankaŭ ne malbona kontribuo al la jubileo.

Oni tamen povas jam konstati kelkajn efikojn de la jubileo, aŭ pli bone, atingojn dum la jubilea jaro

1. La vere grava ĉi-jara IFER-aranĝo, sub la protekto de la UNESKO-Komisiono de GDR, kiu signalas interesan estontan kunlaboron kun tiu komisiono.

2. La novaj atingoj en la amasmedioj, de televido ĝis gravaj partiaj gazetoj kaj fakorganoj.

3. La preteco flanke de la Ministerio por altlernejoj kaj faklernejoj ebligi fakultativan instruadon de Esperanto en la universitatoj kaj altlernejoj de GDR.

4. La ĝenerale objektiviĝanta rilato de lingvosciencaj rondoj de GDR al Esperanto kaj la interlingvistika problemaro, kiu i. a. trovas sian esprimon en la fakto, ke la 14a Internacia Lingvistika Kongreso, okazonta dum aŭgusto 1987 en Berlin, havos „Rondan Tablon Interlingvistiko/Esperanto".

5. Kaj, ne laste, la nova oficejo, kiun GDREA ricevis, atestas pri la konsiderinde plialtiĝinta agnosko de la laboro de GDREA en sia gepatra organizaĵo, t. e. en Kulturligo de GDRE mem.

Tamen, la jubilea jaro ankoraŭ ne finiĝis. Necesas fortostreĉoj por eluzi la eblecojn sed — kio multe pli malfacilas — daŭrigi kaj „elteni" ankaŭ estonte pli altan kvaliton, stimulitan per la jubilea jaro.

LA PREMIO ZAMENHOF 1986 al M'Bow

ENKONDUKO AL LA JUBILEA JARO

En la ĉefsidejo de Unesko en Parizo, Francio, okazis la dua transdono de la Premio Zamenhof je la 16a de decembro. UEA starigis tiun premion en 1985, „por distingi elstarajn personecojn, kiuj laŭ la opinio de la tutmonda esperantistaro aparte kontribuis al la monda paco kaj internacia kompreniĝo". Kompreneble, alia celo estas altiri pli da atento al Esperanto per ĝia ligo kun ekstermovadaj gravuloj, kiuj laboras por similaj idealoj.
Ĉifoje la premiito estis s-ro Amadou Mahtar M'Bow, la ĝenerala direktoro de Unesko. La jenaj paroladoj — enkonduka de Claude Piron, transdona de Grégoire Maertens, akcepta de s-ro M'Bow — reliefigas la kialojn por tiu elekto. Ili prezentiĝis antaŭ okdeko da ĉeestantoj, inkluzive de gastoj kiaj prof. André Martinet, unu el la plej eminentaj francaj lingvistoj, la pola ambasadoro (kiu salutis la kunvenon), funkciuloj de Unesko k. s. Ĉeestis entute kvin estraranoj de UEA, kvankam la prezidanto men kaptiĝis en Novjorko pro kolegia tasko.
Jen, en la vortoj de Piron kaj M'Bow, vivaj bildoj de Esperanto el vidpunktoj en- kaj ekstermovadaj. En dek du jubileaj monatoj, al kiom da homoj ni povos porti tiajn perspektivojn?

Claude Piron

Veti pri Esperanto

Ĉio komenciĝas en la jaroj 1870-aj en parto de la Cara Imperio, kiu nun estas Pollando. Bjalistoko tiam estas kvarlingva urbo: oni parolas en ĝi pole, jide, ruse kaj germane. Junan knabon konstante trafas psike plej dolorigaj vundoj en tiu urbo disŝirata inter kvar komunumoj, kvar religioj, kvar lingvoj (kaj kvar alfabetoj), kvar malamoj. Tie ja multe pli ol aliloke, la simpla fakto vin esprimi etiketas vin. Pro ĝi oni tuj malestimos vin, aŭ solidaros. Ĉiu okazaĵo disvolviĝas sur fono de incitataj etnokulturaj identecoj. Se polo havas administran problemon, estus nepenseble, ke la rusa funciulo parolos la li pole, sed nur kun amare premata furiozo kaj kun espero foje venĝi sin la polo ruse balbutos sian peton. Rilke iam diris, ke verkisto estas homo, kiu verkas, ĉar li ne povas ne verki. Juna Zamenhof starigis la bazojn de Esperanto samkiale: lie ne povis tion ne fari. La kulturaj identecoj sentiĝis en Bjalistiko reciproke atakemaj. Kaj ili unuavice manifestiĝas per la lingvo kaj la maniero prononci. En tiaj kondiĉoj, uzi la lingvon de aliulo signifas ne nur konsenti al li superecon, kontraŭ kiu etna digneco ribelas, sed ankaŭ trudi al si la penon akrobate gimnastiki gramatike vort-uze kaj prononce, aŭ trakuri terenon plenan je kaptiloj kvanzaŭ intence lokitaj, por ke oni pli facile falu en malsuperecon, kaj sentu sin ridinda.

Tiu malamika, humiliga etoso psike vundas Zamenhof, senteman knabon supere talentan. La situacio estas netolerebla. Necesas fari ion, por ke ĉiuj, konservante la propran kulturon, povu komuniki sen tiuj ofendoj al la socikultura identeco, kiuj dramigas la ĉiutagan vivon bjalistokan.

Tiucele, necesus disponi lingvon, kiu apartenu al neniu popolo, kaj kies strukturoj konformu kiel eble plej ĝuste al la natura fluo de lingva esprimado, lingvon, kiu ne devigu akrobati, lingvon, kiun povu regi homoj socie eĉ plej malaltrangaj. Tia lingvo ne ekzistas, ĉu? Negrave! Li ĝin iniciatos. Kun junula naiva fido, la knabo eklaboras, kunigante la sencedan logikon de infaneco, al kiu li ankoraŭ proksimas, kun la maniero agi de artisto, celanta belecon kaj neniam ĉesanta rafini la verkon plu kaj plu.

Ĉu, racie, li havas eĉ plej etan ŝancon

sukcesi? Ni rezonu, se vi bonvolos, vetiste. Ĉu, ĉirkaŭ 1876, vi vetus, ke prosperos al tiu 17-, 18-jarulo, forperdita en fora urbo de fora lando (rilate al la tiamaj brilcentroj) atingi tian ambician celon: la naskon de nova lingvo? Ni konsideru ties historion po-paŝe. Jen la patro de la juna viro sendas lin studi fore kaj igas lin promesi rezigni la lingvan ludadon. Ĉu ne estas realisme pensi, ke la knabo fine komprenos la absurdecon de sia projekto? Sed li persistas. Je la aĝo de 27 jaroj, li decidas publikigi la frukton de sia laboro. Li vizitas la eldonejojn, unu post alia. Sed frenezas neniu: neniu respondas jese. Proprakoste do li presigos etan broŝuron malriĉ-aspektan. Ne disponante reton da librejoj, kiun ŝancon li havos ĝin disvastigi? Ĉu vi vetus favore al tiu absolute nekonata ulo, tiakondiĉe?

Tamen la projekto varbas interesatojn, ĉefe en la rusa imperio. Revuo aperas en la naskiĝanta lingvo. Entuziasmigita, Tolstoj verkas por ĝi. Sed jen li malplaĉas al la ŝtato kaj la cara cenzuro malpermesas la revuon, solan ligilon inter la unuaj lingvanoj. Riceviinte tiun informon, ĉu vi vetus, ke vivplena lingvo laŭgrade naskiĝos el projekto plagita per tia fuŝa komenco? Sed la vivo obeas alian logikon. En la kvin mondopartoj, homoj ekscias pri la lingvo kaj eklernas ĝin. Ridegas la lingvistoj, plej moke: ĉiu uzos la lingvon (ili diras) laŭ la propra maniero apliki gramatikon, kompreni la sencon de vorto, prononci; ne eblos interkompreniĝo. Al kiu iros via favora veto? Ĉu al la juna amatoro? Ĉu al la unuanimaj fakuloj?

Jes ja, ĉe la unua kongreso en Bulonjo-ĉe-Maro, en 1905, la novlingvuloj taŭge interkompreniĝas, sed kial oni prenus serioze etan aron da stranguloj? El la vidpunkto de la parizaj salonoj, kiuj, tiutempe, difinas la valoron de ĉio por ĉiu, la nova lingvo ne montriĝas alloga. Svarmas en ĝi malfrancaj literoj kiel k kaj j, plus konsonantoj ĉapelitaj de ridinda supersigno. Ĝi aspektas forpuŝe, barbare. Tutmonde, la intelektuloj ĝin forĵetas. Ke al la iniciatinto mankas realismo, tion cetere pruvas lia stranga elekto de supersignaj konsonantoj troveblaj en neniu presejo, tiel ke, se oni volas aperigi ion tiulingve, necesas antaŭa fandigo de novaj prestipoj. Se bazi sin sur sana prudento, veti, ke tiu lingvo plu vivos, estas oferi monon al Sankta Neredono.

1914: milito ekflamas. Mortas Zamenhof. Faru viajn vetojn, gesinjoroj ... Kiu vetos por tiu orfa lingvo, simbolo de egalecaj rilatoj en mondo, kiun regas la leĝo de l' ĝangalo?

Alvenas la jaroj 20-aj. Ĉe la Ligo de Nacioj, Irano proponas alpreni Esperanton por la internacia rilatado. Ĉiuj miregas! Kaj la grandaj potencoj pretiĝas al batalo. „Tiun proponon oni enterigu, ĝi estas danĝera por nia kultura superaco". Tiuj ŝtatoj estas riĉaj kaj influaj, iliaj delegitoj ne hezitas atenci la veron plej hontinde. Refoje oni mokas kaj forĵetas la projekton. Sincere, tiudate, ĉu sur ĝin vi metus la vetaĵon?

Jen ekregas Stalin kaj Hitler. Hitler jugas Esperanton lingvo de juda konspiro, kaj de framasona; Stalin, de burĝaj kosmopolitoj. En la jaroj 40-aj, tiuj du havas preskaŭ plenan potencon super kontinenta Eŭropo. Esperanto estas malpermesita, ĝiaj librostokoj likvidiĝas, multajn el ĝiaj anoj oni enŝlosas koncentreje. En Japanio, Ĉinio, Hispanio, Portugalio kaj aliaj landoj, la regantoj plenumas rilate al ĝi malpli perfortan politikon, sed tamen samdirektan. Diru al mi: kiun sekvon estus saĝe priveti tiuepoke, se ne la baldaŭan forpason de la lingvoi?

Finiĝas la dua mondmilito, jen aperas la sistemo de samtempa interpretado. Tiu ŝajne solvas la komunikproblemon en kongresoj kaj konferencoj, sed fakte ĝi apenaŭ sukcesas maski evoluon, kiu ebligas al la angla superregi senkonteste. Evidentiĝas ,ke en internaciaj rilatoj la angla emas monopoli. Ĝi estas la lingvo de inform-agentejoj, de multnaciaj kompanioj, de scienca eldonado same kiel de la muzikoj, laŭ kiuj, en la tuta mondo, dancas junularo usonece vestita.

Fronte al tia Goljato*), Esperanto estas Davido**), tiel eta, ke ĝi preskaŭ nevideblas. Konsiderante ambaŭ rivalojn, kiu, racie, vetos por la dua? Ĉu havus

sencon la vetgajnon dependigi de lingvo, kiun subtenas neniu vasta socia movado, kiun financaj potencoj ignoras, kiun prisilentas la amaskomunikiloj, kiun la intelektuloj mokas, aŭ taksas mortnaskita? Konstante atakata jen politike, jen intelekte, ekde la publikigo, ĝi havas nek aliancanon, nek helpon eksteran. En epoko, kiam furoras vidaj mesaĝoj kaj bilda prezentado, ĝi ne disponas rimedojn por brile reklami pri si. Ĝi disvastiĝas nur pro la propraj, ne okulfrapaj, sed altvaloraj kvalitoj.

Kaj tamen, se juĝi laŭ objektivaj kriterioj — libroproduktado, partopreno en internaciaj kunvenoj geografia areo kovrita de la anoncoj en la esperantlingva gazetaro, kvanto de esperantistaj eventoj, radiodissendado, nombro de lokoj, kie eblas kontakti esperantiston, ktp. —, oni rimarkas, ke, kun plioj kaj malplioj sekvantaj la fluon de la politika kaj ekonomia vivo, Esperanto neniam ĉesis laŭgrade disvastiĝi, kaj ke, precipe, en la lasta jardeko ĝia progresado rimarkinde akceliĝis.

En 1976, 30 universitatnivelaj institucioj instruis ĝin; ĉi-jare, ili estas 125, t. e. pli ol kvarobligo en dek jaroj. Esperanto estas la lingvo de konsiderinda literatura produktado, kiu ne ĉesas ampleksiĝi. Ĝi estas la lingvo, en kiun, tutmonde, tradukiĝas plej multe da kantoj. Oni uzas ĝin ĉiutage eĉ radio en landoj tiel malsamaj kiel Ĉinio kaj Pollando. Ĝi estas la ĉiutaga interkomprenilo de multaj paroj dunaciaj, kaj la gepatra lingvo de iu nombro da infanoj. Se objektive analizi la rilaton efikeco/kosto, ĝi montriĝas internacia komunikilo ege supera al la angla kaj al la sistemoj bazitaj sur tradukado kaj samtempa interpretado.

Se nun estus 1887, kaj vi tenus enmane la etan broŝuron de la perfekte nekonata dudeksepjarulo, ĉu vi imagus, ke post iom malpli ol jarcento, la plej vasta internacia kongreso en la tuta historio de Ĉinio disvolviĝos tiulande en la lingvo, kies plej freŝa ĝermo jen montriĝos al vi? Ĉu vi tiujare vetus, ke en 1986 ne troviĝos unu tago sen, ie en la mondo, esperantlingva kongreso, konferenco, kunsido aŭ kultura aranĝo? Tiel tamen la realo prezentiĝas.

Konstati, ke la raciaj vetoj konstante kontraŭas la faktan disvolviĝon de la okazaĵoj, estas pripensige. Se esplori pli profunde, evidentiĝas, ke la malfavoraj opinioj pri la estonteco de Esperanto baziĝas sur la sama, ĉiufoje ripetata misfaro: oni ne kontrolas la realon, oni ne rigardas, kiel Esperanto praktike funkcias kompare kun la aliaj sistemoj uzataj por interkulture komuniki. Krome, oni supertaksas la eksterajn premojn kaj subtaksas la rolon de individuaj sentoj en lingvoviviga kaj -disvastiga procezo. Kiel Esperanto elmontras pli grandan viglon ol iuj lingvoj kun oficiala statuso, kiel la gaela aŭ la romanĉa? Ĉar homoj ŝatas krei, ludi, ĝui liberecon kaj rilati amike.

La strukturoj de Esperanto stimulas lingvan kreemon, kiu subpremiĝas en la plimulto el la lingvaj teritorioj, ekde kiam infano fariĝas lernejano. Ili havigas al la lingvo ludan etoson, malestimatan de tiuj, kiuj prenas sin serioze, sed respondan al grava sopiro kuŝanta funde de nia psiko. Gramatike, vortfare, stile plej fleksebla, Esperanto elvokas senton de libereco en la maniero esprimi sin, kian samgrade allasas neniu alia fremda lingvo, kaj tio ĝueblas sen devi tede, multjare studadi. Kaj ĉefe, ĝi ebligas havi verajn kaj daŭrajn amikecojn trans la kulturaj limoj, kaj tiel ĝi kontentigas psikologian bezonon pli profundan, ol oni ĝenerale imagas.

Estas fakto: en jarcento, Esperanto teksis sur la tuta terglobo abundon da amik-retoj, kiuj ligas unuj al la aliaj homojn el ĉiuj sociaj tavoloj, el ĉia medio kultura. Tiukampe, neniu rivalas kun ĝi.

Ĝi rajtus rigardi de alte ĉiujn, kiuj dum tuta jarcento vetadis kontraŭ ĝi, kaj ĉiufoje perdis. Sed ne estus laŭ ĝia stilo. Ĝi ne trudas sin. Al ĝi sufiĉas esti, kaj vivi. Havebla, por tiuj, kiuj pretas kunludi. Diskreta, eĉ nevidebla, por tiuj, kiuj preferas komuniki per pli kosta, pli nejusta, pli malsimpla sistemo. Iom malĝoja, jes ja, ke oni tiel ofte rigardas ĝin alia, ol ĝi efektive estas, kaj ke oni plu preteratentas la altvaloran kontribuon, kiun ĝi povas

alporti, interpopole, ne nur al amikeco kaj facileco, sed ankaŭ al pli justa rilatado kaj al la emo respekti ĉies lingvan dignecon.

*) Giganto, en la Biblio.
**) Etulo, kiu venkis la giganton Goljato.

de la speco de Zamenhof, ni estas konvinkitaj, ke tiu sama mondo komprenas la neceson atenti ankaŭ la lingvan dimension de la internacia kompreniĝo.

Grégoire Maertens,
Vicprezidanto de UEA

Transdona parolado
de la vicprezidanto de UEA:

„La mondo . . . komprenas najn revojn kaj idealojn"

Sinjoro Ĝenerala Direktoro,
gesinjoroj! . . .

Laŭ unuanima decido de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, la ĉi-jara laŭreato de la Premio Zamenhof estas s-ro Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, kiu hodiaŭ estas nia honora gasto ĉi tie.

Kial ĉi tiu decido? Ĉar ni konsideras s-ron M'Bow homo kun vidpovo pri la estonteco. Ĉar ni trovas lin homo, kiu kuraĝe frontas la bazan problemaron de la nuna mondo. Ĉar li scipovas montri novajn vojojn al la solvo de problemoj, kiujn malmultaj kuraĝas alfronti rekte. Ĉar laŭ ni li pruvis sin homo posedanta aŭdsenton por novaj Ideoj. Ni admiras la manieron en kiu li persiste defendas idealojn, fundamente gravajn por la homaro.

Kvankam Unesko jam en 1954 per rezolucio de sia Ĝenerala Konferenco en Montevideo rekonis, ke la idealoj kaj celoj de la Esperanto-movado kongruas kun tiuj de Unesko mem, s-ro M'Bow estis la unua altranga funkciulo de Unesko, kiu al tio dediĉis personan atenton. Ni dankas al li, ke li tra la pasintaj dek jaroj plurfoje trovis tempon interŝanĝi kun ni opiniojn pri niaj komunaj celoj.

S-ro Ĝenerala Direktoro, ankaŭ la adeptoj de la Internacia Lingvo trovas, ke la nunan mondon regas internacia komunika malordo, kiun ordo nomas nur tiuj, kiuj profitas el ĝia maljusteco. Ni, same kiel vi, estas forte konvinkitaj ke ŝanĝoj sur tiu kampo estas fundamente necesaj kaj urĝaj. Ni estas, same kiel vi, por Nova Internacia Komunikado Ordo. Eĉ se vi nun ŝojnas en la okuloj de la mando esti revulo

Akcepta parolado:
Amadou Mahtar M'Bow

„Ni dividas ion profunde komunan: nian kredon je la homo"

Sinjoro Prezidanto, kara Profesoro (Piron), gesinjoroj:

Antaŭnelonge mi legis historian verkon, kiu okupiĝas pri la 19-a jarcento. Unu fakto frapis min tiam, fakto kiu estis en tiu epoko memevidenta, sed kiu hodiaŭ ŝajnas al ni apenaŭ kredebla: letero sendita de Londono al Delhio povis bezoni ses monatojn por atingi sian ricevanton, kaj ĝia sendinto devis atendi unu jaron por ricevi eventualan respondon. Hodiaŭ tia letero farus la saman vojaĝon en du aŭ tri tagoj, telegramo en unu aŭ du horoj, telekso alvenus tuj. La tuta tero estas nun plektita en ĉiam pli densa reto de kontaktoj kaj informinterŝanĝoj, pere de kiuj kreskanta nombro da personoj sin trovas ligitaj al la mondo en ĝia tuteco, kaj ĉiutage spertas ĝian senliman diversecon.

Estas la ekesto de tia evoluo kiu sendube instigis antaŭ cent jaroj d-ron Zamenhof koncepti unikan komunikilon, lingvon neŭtralan, apartenantan nek al la propra nek al ajna nacio, kapablan ekde tiam funkcii kiel komuna komunikilo por ĉiuj nacioj . . . Atestanto de senfinaj kvereloj rezultantaj el la miskomprenoj, kiuj regis inter la malsamaj religiaj kiaj lingvaj komunumoj, d-ro Zamenhof tiam iniciatis Esperanton, kiel komunan malfermilon kaj komprenilon, perilon de interpopola proksimiĝo kaj finfine — kiel ĝia nomo sugestas — de espero, de fido je mondo de universala frateco.

Kiel emfazis la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, pri kiu vi ĵus parolis, sinjoro Prezidanto, Espe-

ranto nun definitive prezentiĝas kiel unu el la plej efikaj iloj de internacia interkompreniĝo, favoranta komunajn interrilatojn en ĉiuj sferoj de kulturo kaj scienco. Fine, la vivanteco de Esperanto manifestiĝas ankaŭ en tio, ke la Esperanto-movado estas movado de profunde humanisma inspiro. Ĝi estas movado kiu frontas ankaŭ pli vastajn demandojn, kiuj preteriras la nuran zorgon diskonigi la lingvon. Tiel, kunveno de fakuloj organizita pasintjare en la ĉefsidejo de Unesko fare de UEA, traktis temojn kiel: „Ĉu oni povas akcepti la modelon: unu lando, unu nacio, unu lingvo?"; „Kia estas la estonteco de minoritataj lingvoj?"; „Kion fari pri la lingvoj kiujn heredigis la kolonia sistemo?".

Do Esperanto lokis sin ĉe la kerno de plej vivanta kaj aktuala problemaro, tiu de la vojoj kaj metodoj por proksimigi la popolojn kaj kulturojn de la mondo per helplingvo kun universala celo, kiu ekzistas kune kun ĉiuj naciaj kaj regionaj lingvoj sen minaci iujn ajn; sed mi aldonu ankaŭ, ke tiu ĉi lingvistika aspekto integriĝas en multe pli vastan humanisman vizion, kaj sendube, apartigita de tiu humanisma vizio, la teknika aspekto de la lingvo ne permesus vere kompreni, kio estas la Esperanto-movado.

Jen kial, sinjoro Prezidanto, mi deziras ke Esperanto, kiun jam alprenis centoj da miloj da homoj en la tuta mondo, same kiel multnombraj universitatoj, estu ankoraŭ pli vaste uzata en la estonteco, kaj ke la esperantista komunumo, kune kun ĉiuj esperoj, kiujn ĝi portas en si, daŭre plivastiĝu en ĉiuj landoj.

Ĉi tiu premio estas sendube multe pli grava por mi ol multaj premioj, kiujn mi jam ricevis. Kiam mi unuafoje ĉeestis la kongreson de via asocio en Rejkjaviko, mi estis profunde emociita pro la sentemo de la membroj rilate la plej premajn problemojn de nia epoko, pro ilia preteco kontribui pli vastskale, sendube, ol povis d-ro Zamenhof, al la proksimigo de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj de la mondo. Ankaŭ vi, sinjoro Prezidanto, ne aŭskultas tiujn por kiuj ĉi humanisma projekto fariĝas projekto utopia. Ĉar — kiel vi diris — utopio, kiu inspiris d-ron Zamenhof, efektiviĝis kaj efektiviĝas.

Jen kial mi havas la plej altan respekton por ĉiuj, kiuj partoprenas en la Esperanto-movado, kaj mi ĉiam ĝojas povi interŝanĝi opiniojn kun ili, ĉar mi scias, ke ni dividas ion profundan: nian kredon je la homo, kiu ajn estas la koloro de lia haŭto, kiu ajn estas lia religio, kiu ajn estas la filozofio kiun li havas kaj, egale, kiu ajn estas la lando kie li loĝas.

Tial, sinjoro Prezidanto, je mia propra nomo same kiel je la nomo de Unesko, al kiu ĉi tiu honoro iras pere de mia persono, mi petas vin kredi ke, en ĉi tiu Jubilea Jaro de Esperanto, mi plene estimas la valoron de la premio kiun vi ĵus transdonis al mi kaj mi tre profunde vin dankas pro ĝi. Dankon al ĉiuj.

[La materialoj pri la distingo de la ĝenerala direktoro de UNESKO aperis en „Esperanto" 1/87]

Seminare des Esperanto-Verbandes

1. **Seminar über Probleme der nationalen und internationalen Arbeit des Esperanto-Verbandes. Für junge Verbandsmitglieder. 11. bis 17. Oktober 1987 in Lychen (b. Fürstenberg, Bez. Neubrandenburg). Teilnahme kostenlos. Anmeldungen sofort an Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080, Telefon 28 26 34 3. Anmeldeschluß: 17. Oktober.**
2. **Seminar über Probleme der nationalen und internationalen Arbeit des Esperanto-Verbandes. Für Teilnehmer und Absolventen von Fernkursen. 25.—30. Oktober 1987 in Lychen. Gleiche Bedingungen wie unter 1.**

Beide Seminare bieten auch Möglichkeiten der sprachlichen Weiterbildung.

Sonderbriefmarke der DDR über Esperanto

Anläßlich des Jubiläums des Esperanto gab die Deutsche Post einen Block (0,85) heraus. Das Sonderpostwertzeichen ist ab 7. Juli 1987 an den Postämtern erhältlich. Die Auflagenhöhe beträgt 2,1 Millionen. Ein Sonderstempel läuft vom 7. 7. — 7. 9. 1987 auf dem Postamt Berlin 1020.

IFER'87: Uneske pri la jubileanta lingvo

La jam kutima Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo ĉi-jare, de 13. — 15. 3. 87, estis nekutima. Kun tre multflanka kaj altnivela programo kaj preskaŭ 300 partoprenantoj el 15 landoj, sub la protekto de la UNESKO-Komisiono de GDR, ĝi estis la centra kaj ĉefa aranĝo de GDREA honore al la centjariĝo de Esperanto. Teamo de sindediĉaj preparaktivantoj ĉefronte Sabine kaj Joachim Schulze, Michael Behr kaj Rolf Beau kaj multaj aliaj laboregis en daŭra kontakto kun la Centra Estraro de GDREA kaj sukcesigis ĉi-tiun aranĝon, kies moto estis „Cent jaroj de Esperanto: lingvo de interpopola kompreniĝo". La teknika kadro: la porjunulara klubejo „Interpopola Amikeco" donis bonegajn kondiĉojn.

La 275 partoprenintoj venis el Aŭstrio, Belgio, Bulgario, ĈSSR, Francio, FRG, GDR, Granda Britio, Hungario, Nederlando, Novzelando, Pollando, Soveta Unio, Svisio kaj Svedio.

Vendrede, la 13an de marto, vespere, d-rino Sabine Fiedler por la Organiza Komitato malfermis IFER. Salutparoladis la membro de la Prezidia Konsilantaro de Kulturligo de GDR kaj prezidanto de la Distrikta Organizaĵo Leipzig de KL, prof. d-ro sc. Peter Held kaj por la Centra Estraro de GDREA, d-ro sc. Detlev Blanke. Sekvis intervjuetoj de Michael Behr kun reprezentantoj de la partoprenantaj landoj. La konata Esperanta skeĉaŭtoro kaj satiristo Stefan McGill, novzelandano, nun loĝanta en Hungario, prezentis kelkajn konatajn de li skeĉojn, i. a. la specimenojn de lia „plene" fonetigita Esperanto. Popoldanca muzikgrupo kaj diskoteko invitis al dancado.

La oficiala jubilea aranĝo, sub la reĝisorado de la Centra Estraro de GDREA, okazis sabaton, la 14an de marto, antaŭtagmeze. Inter la germanaj honoraj gastoj oni povis i. a. saluti la mebron de la prezidio de la UNESKO-Komisiono de GDR kaj prezidanton de ties kultura sekcio, d-ron Helmut Tautz, la iaman ĉefurbestron de Leipzig kaj nunan prezidanton de la asocio de komunumaj parlamentoj de GDR, Walter Kresse, la prezidanton de la Distrikta Estraro de KL Leipzig, prof. d-ro Peter Held kaj la unuan sekretarion de la Distrikta Estraro, d-ro Rudi Fiedler.

Inter la eksterlandaj honoraj gastoj troviĝis la ĝenerala sekretario de Universala Esperanto-Asocio (UEA), d-rino Flora Szabo-Felsö, la membro de la prezidio de UEA, kaj vicprezidanto de HEA prof. d-ro Otto Haszpra (ambaŭ el Hungario), la ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Clement Tholet (Belgio), la membro de la prezidio de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĉefredaktoro de „Paco", Violin Oljanov (Bulgario), la vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj direktoro de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia, Andrzej Pettyn kaj la vicprezidanto de la Akademio de Esperanto, d-ro Werner Bormann (FRG). Krome oni salutis la veteranon de la sovetia Esperanto-movado kaj honoran civitanon de Dresden, Isaak Krolik el Soveta Unio kaj la konsulon de la pola ambasado en GDR, d-ron Zygmont Jagielski.

Post muzika enkonduko (preludio en C maĵoro de J. S. Bach, ludita de piankvinteto sub gvido de Dankward Pfeiffer) la solenan aranĝon malfermis la prezidantino de la Distrikta Estraro de GDREA, Sabine Schulze. Sekvis la multrilate surpriza parolado de la reprezentanto de la GDR-UNESKO-Komisiono, d-ro Helmut Tautz. Surpriza, ĉar tute en bonega Esperanto, surpriza, ĉar d-ro Tautz havis rektan rilaton al la priesperanta UNESKO-rezolucio de Sofio, surpriza, ĉar la preleginto elstarigis senrezerve la valorojn de Esperanto kaj donis klaran perspektivon por plua kunlaborado inter la Komisiono kaj GDREA. D-ro Tautz ankaŭ transdonis la salutojn de la vicministro por eksteraj rilatoj kaj prezidanto de la UNESKO-Komisiono de GDR, Peter

Florin, kaj de la ministro por kulturo de GDR, d-ro Hans-Joachim Hoffmann. Pro ĝia graveco, ni sube publikigas la kompletan tekston de la parolado, kiu bone klarigas al la neĉeestintoj, kial ĉi-tiu parolado havis tiel grandan efikon.

Sekvis salutmesaĝo de la ĝenerala sekretario de UEA kaj, post violinmuzikaĵo de la juna Fred Ulrich (sarabando de J. S. Bach), kvar koncizaj prelegoj, kiuj prilumis diversajn aspektojn de la jubileanta lingvo. Andrzej Pettyn el la naskiĝurbo de Esperanto skizis la historian situacion de la jaro 1887, la unuajn eĥojn en la gazetaro pri la nova lingvo. Li montris kelkajn gravajn etapojn de Esperanto, kiuj estis ligitaj al Pollando kaj finis per invito al la jubilea kongreso 1987 en Varsovio.

Clement Tholet, la ĝenerala sekretario de MEM, ankaŭ aktivulo de la belga pacmovado, elstarigis la kontribuon de la Esperanto-movado al la pacmovado, kaj aparte substrekis la agadon de MEM. Pri la pacagado de esperantistoj ankaŭ temis la mesaĝo de Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM kaj multmerita internacia kaj bulgara esperantista aganto, kiun prezentis Violin Oljanov. Aleksiev traktis la tradiciojn de la laborista Esperanto-movado kaj ilian signifon por la aktuala pacbatalo de la esperantistoj.

La membro de la prezidio de UEA kaj eksperto pri la scienc-teknika apliko de Esperanto, prof. d-ro Otto Haszpra, montris rezultojn kaj perspektivon de Esperanto en la scienc-teknika revolucio. La programo, reĝisorita de la sekretario de GDREA, finiĝis per omaĝo al Bach, komposita de la muzikisto-esperantisto Dankward Pfeiffer 1982 por IFER (okaze de la programo pri Bach, Schütz kaj Händel). Dum la posttagmezo oni povis elekti inter jenaj prelegoj: „La universaleco de UEA" (d-rino Flora Szabo-Felsö), „Scienc-teknika revolucio kaj Esperanto" (prof. d-ro Otto Haszpra), „La Akademio de Esperanto kaj la esperantistoj" (d-ro Werner Bormann), „Esperanto kaj moderna ŝlosila teknologio" (d-ro Peter Broczko, Hungario), „La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno" (Herbert Mayer, Aŭstrio), „La projekto de duonaŭtomata tradukado DLT" (d-ro Klaus Schubert, Nederlando).

Fine de la prelega parto oni povis rigardi la tre impresan filmon „Berlino — releviĝinta el ruinoj", filmo, kiu konfrontas filmpartojn faritajn de usona piloto pri la bombita Berlin kun la nunaj modernaj kvartaloj sur la samaj lokoj.

La kultura vespero enhavis tre aplaŭditajn dancojn de hinda (studenta) ensemblo kaj — kompreneble — tre konvenan disko-muzikgrupon. Dimanĉe oni povis aŭskulti prelegojn de Violin Oljanov („Ĉu la Zamenhofa gramatiko vere nur havas 16 regulojn?"), de la sovetia astronomo, d-ro Andronov pri „La strukturo de magnetaj malvastaj duoblaj stelaj sistemoj". Oni povis konatiĝi kun la ĉeha kaj Esperanta verkisto Jiři Karen kaj ĝui satirajon de La Psiko (pseŭdonimo de debutinto el Leipzig) „La verda malsano", prezentita de Rudolf Burmeister. La antaŭtagmezo, kaj per tio IFER '87, finiĝis per violinsolo de Fred Ulrich „Treblinka", prezentita de la juna violinisto, kiu ankaŭ komponis la muzikaĵon okaze de vizito en la iama koncentrejo. En Treblinka pereis familianoj de Ludvig L. Zamenhof ... Dum la posttagmezo terminologie interesitaj homoj kunvenis sub la gvido de Ivan Bujdoso (Hungario) kaj Wera Blanke por informiĝi pri la fondota Terminologia Centro de UEA.

Restas mencii ankoraŭ multo: la filatela eksponaĵo de Rudof Burmeister, libro-stando, fotoservo, radiointervjuoj, televida registraĵo por la „Aktuala Kamero" inkluzive intervjuon kun Clement Tholet, prezento de Leipziga debuto libro de La Psiko (Hunda vivo kaj aliaj satiroj) k. m. a.

Entute digna aranĝo dum la jubilea jaro, kiu prezentas pluan ŝtupon en la stabila kvalita evoluo de la IFER-aranĝoj.

— e

Redakcia noto: Ni rimarkis kun ĝojo, ke la organo de UEA, „Esperanto", en n-ro 5/87, p. 83 prezentis raporton pri IFER el la plumo de Stefan MacGill.

Parolado de d-ro Helmut Tautz:

Esperanto estas pli ol lingvo

Tre estimataj gesinjoroj, karaj gekamaradoj kaj geamikoj!

En la nomo de la nacia UNESKO-Komisiono de Germana Demokratia Respubliko mi plej kore salutas la partoprenantojn de la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo IFER '87 en Leipzig.

La UNESKO-Komisiono de GDR dum la pasinta jaro, dum la Internacia Jaro de Paco, prenis la decidon patroni la jam tre tre konatan trans la limoj de nia lando aranĝon. Tiel agante ĝi sekvis la rekomendon de la 23-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO al la membroŝtatoj solenadi per laŭcelaj aranĝoj la centjaran ekzistadon de Esperanto en la jaro 1987, fiera jubileo. Por mi estas honoro kaj ĝojo transdoni al ĉiuj ĉeestantoj la plej korajn salutojn kaj bondezirojn de la prezidanto de la UNESKO-Komisiono de GDR, Peter Florin, vicministro por eksteraj rilatoj, kaj de la ministro por kulturo de GDR, d-ro Hans-Joachim Hoffmann.

Bonvolu permesi al mi personan rimarkon. Por mi estas aparte agrable hodiaŭ paroli antaŭ vi pro du kaŭzoj. Unue, kiel membro de la delegitaro de GDR en la 23-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO mi partoprenis en Sofio. Oni elektis min internacia raportanto en tiu komisiono, kiu pritraktadis la problemkomplekson de kulturpolitiko, en kiu oni ankaŭ alprenis la decidon pri la al vi ĉiuj konata rezolucio 11.11. Krome mi sentas min proksimligita al vi kaj viaj strebadoj ankaŭ pro tio, ĉar antaŭ 40 jaroj kiel lernanto kaj studento mi estis fervora esperantisto. Mia patro jam dum la 20aj jaroj kiel aktiva laborista esperantisto en la iama Chemnitz[1]) infektis min per sia entuziasmo. Pli poste pro la neceso aktive uzadi aliajn lingvojn la Esperanto-kapabloj malfortiĝis, sed eble la hodiaŭa aranĝo kontribuos al ĝia reaktiviĝo.
Estimataj geamikoj!

Kiam antaŭ cent jaroj la varsovia okulisto doktoro Zamenhof publikigis sian famiĝintan libreton sub la pseŭdonimo „D-ro Esperanto" li metis al la koro de siaj kunhomoj kaj de estontaj generacioj genie elpensitan sed relative facilan internacian komprenilon. Siatempe li nur povis esperi, ke efektiviĝu lia sonĝo pri la popolojn-liga lingvo.

Pasis cent jaroj — historie mallonga tempo, sed la alte intelekta eltrovaĵo de doktoro Zamenhof ne plu estas forpensebla el la vivo de la popoloj en la internacia komunikado. Kreiĝis daŭre kreskanta monda movado, monda organizaĵo UEA kun sekcioj kaj individuaj membroj en ĉiuj kontinentoj. Rimarkinda kolekto de verkoj de la mondliteraturo estas tradukita en Esperanton, oni instruas Esperanton en lernejoj, universitatoj kaj popolaj altlernejoj de multaj landoj. Aperadas gazetoj kaj revuoj en Esperanto. Estas disaŭdigataj radio-elsendaĵoj okazos internaciaj kongresoj, kolokvoj, seminarioj kaj amikecrenkontiĝoj en Esperanto sen simultan-tradukistoj en la tiel nomataj laborlingvoj. La tempo, kiam oni priridis la adeptojn de la „sintetika lingvo" kiel fantaziulojn, jam longe forpasis; per sia serioza laboro ili jam longe pruvis, ke Esperanto ne plu estas morta lingvo, ke ĝi vivas kaj kuniradas kun la tempo, evoluadas kaj disponas pri nelimigitaj eblecoj de variado kaj kapablas ankaŭ esprimi ĉiujn modernajn evoluprocesojn en scienco kaj tekniko, en la politika, ekonomia, socia kaj kultura sferoj. Ĝia plej gran-

da merito tamen sendube kuŝas en la kontribuo, kiun Esperanto donis por la internacia interŝanĝo de pensoj kaj spertoj, en la reciproka kultura interkonatiĝo kaj per tio por la reciproka interkompreniĝo. Laŭ sia fundamenta celo la Esperanto-movado estas pacmovado. Sendepende de la rego de unu el la disvastigitaj lingvoj ĝi inkludas anojn de ĉiuj sociaj klasoj kaj tavoloj, de ĉiuj nacioj, ĉu de grandaj aŭ malgrandaj. Jes, ĝuste al la anoj de la pli malgrandaj nacioj, kies lingvoj nur en limigita grado estas disvastigitaj kaj komprenataj, ĝi donas la necesan internacian kadron, por pledi por paco, malarmado, internacia kunlaboro kaj komunikado. Per tio Esperanto estas pli ol lingvo, ĝi estas „ligilo", kiu kreas senton de kunaparteno, de solidareco, de reciproka estimo kaj de optimismo por la estonteco. Kontribui al la paco kaj la sekureco, per akcelado de la kunlaboro inter la popoloj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo tio estas la celo de UNESKO, fondita antaŭ 40 jaroj, la intelekta monda organizaĵo de la UNO-sistemo. Dum la kvar jardekoj de ĝia ekzistado ĉi tiu organizaĵo atingis grandan aŭtoritaton kiel nemalhavebla forumo de scienca kaj kultura kunlaboro de dialogo kaj de spirita interŝanĝo. Jam tre frue UNESKO ekkonis la gravan rolon de Esperanto kongrue kun la celoj kaj principoj de UNESKO.

Jam dum la Ĝenerala Konferenco en la jaro 1954 en Montevideo oni akceptis apartan rezolucion pri Esperanto kaj pri la kunlaboro de UEA, Universala Esperanto-Asocio. Intertempe UEA atingis la statuson de konsultaj rilatoj en la kategorio B ĉe UNESKO, kaj mi kredas, ke tia prognozo ne estas fantaziaĵo, ke iam Universala Esperanto-Asocio estos alte estimata kaj aktiva organizaĵo en la statusa kategorio A de UNESKO. Dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto paroladis la Ĝenerala Direktoro de UNESKO aŭ liaj oficialaj reprezentantoj. Ĝisnuna kulmino en la aprezado de Esperanto fariĝis la jam menciita rezolucio de la 23a Ĝenerala Konferenco de UNESKO lige al la centjara ekzistado de la monda lingvo.

Ankaŭ en nia lando kreskadas la Esperanto-movado organizita en Kulturligo de GDR, ĝia kunlaboro en Universala Esperanto-Asocio kaj en Mondpaca Esperantista Movado. La regule okazantaj foiraj renkontiĝoj IFER estas malgranda ekzemplo por tio. La UNESKO-Komisiono de GDR pro tio volonte transprenis la patronecon por la foira renkontiĝo dum la jubilea jaro de Esperanto. Por ni tio ne restos la sola ago. Ni jam interkonsentis kun la sekretario de Esperanto-Asocio de GDR, doktoro Blanke, ke li dum septembro raportos antaŭ la faksekcio kulturo ĉe la UNESKO-Komisiono de GDR pri la Universala Esperanto-Kongreso en Varsovio kaj pri la hodiaŭ malfermita aranĝo. Ni ankaŭ transdonos informon pri la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1987 al la Ĝenerala direktoro de UNESKO, al s-ro Amadou Mahtar M'Bow.

Tre estimataj gesinjoroj,

karaj geamikoj!

Kiel neniam antaŭe dum la historio de la hormaro ni hodiaŭ staras antaŭ la sortondecida demando: transvivi en luman, pacan estontecon aŭ pereo de nia planedo en nukleo inferno. Ne ekzistas pli grava demando en nia tempo ol la konservado de la paco. Ankoraŭ neniam en la historio la fortoj agantaj por la paco — sendepende de diferencoj de ŝtataneco, de sociaj sistemoj, de raso, religiaj konvinkoj kaj kulturaj tradicioj, estis tiom potencaj kaj ligitaj al komuna celo. En ĉi-tiu mondvasta movado de la racio, de la vivovolo kaj de la decido ne al la nuklea vetarmado kaj militigado de la kosmo la Mondpara Esperantista Movado estas fidinda aliancano. Mi deziras al vi kaj al ni en tiu agado sukceson kaj al via renkontiĝo ĉi-tie en Leipzig multajn interesajn prelegojn kaj informojn, utilan pensinterŝanĝon, interesajn homajn kontaktojn, renkontiĝojn kun malnovaj kaj novaj amikoj kaj solidaran komunecon.

[1]) hodiaŭ Karl-Marx-Stadt

Oficiala komuniko de IFER-OK

La Organiza Komitato de la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo" (IFER) okazigos ĉi tiun samnoman aranĝon de la **11-a ĝis 13-a de marto 1988** en la foira urbo Leipzig (Germana Demokratia Respubliko).

LA IFER-OK,
konsiderante la fakton, ke faka aplikado de Esperanto en scienco, tekniko kaj kulturo en la nuntempo ludas gravan rolon,
elektis por la 1988-a aranĝo la ĉeftemon HOMO KAJ SCIENC-TEKNIKA REVOLUCIO,
volante diskonigi la grandajn eblecojn kaj atingajojn de Esperanto sur fakaj kaj kulturaj kampoj,
invitas ĉiujn partoprenemulojn al ĉi tiu internacia aranĝo,
atendas denove internacian partoprenantaron el multaj landoj de nia terglobo,
gastigos 250 geesperantistojn dum la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1988",
ekpetas jam nun de fakuloj proponojn pri prelegoj ktp., kiuj rilatu al la ĉeftemo de „IFER '88",
aperigos meze de la 1987-a jaro ampleksan bultenon, kiu enhavos ĉiujn kondiĉojn de partopreno. **Jam nun eblas mendi ĉi tiun informilon ĉe adreso de la IFER-OK.**
Krome la IFER-OK atentigis pri kelkaj gravaj ŝanĝoj:

1-e: Partoprenemuloj el GDR anoncu sin nur ĉe siaj koncernantaj Distriktaj Estraroj de GDREA kaj ne plu rekte ĉe la IFER-OK en Leipzig!

2-e: Limdato por aliĝo estos la **31-a de decembro 1987!** Post ĉi tiu dato aliĝiloj restos netraktitaj!

3-e: La IFER-OK invitas ĉi-voje fakajn asociojn ligitajn kun UEA al okazigo de iliaj jarkunvenoj enkadre de la „Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo 1988". Organizoj, kiuj intencas kapti ĉi tiun oferton, turnu sin eble baldaŭ al la IFER-OK.

Nia kontaktadreso:
Kulturbund der DDR (Kulturligo de GDR)
Organiza Komitato de IFER '88
Käthe-Kollwitz-Straße 115
Leipzig
DDR — 7010

UNESKO-materialo por IFER 87

La Direktoro de la Centra Oficejo de UEA, Osmo Buller (Finnlando), sendis al IFER UNESKO-dokumenton en Esperanto, kiun ricevis ĉiu partopreninto. En la akompana letero li skribis:
„Bonvolu akcepti miajn korajn gratulojn pro la alta apogo, kiun via renkontiĝo ĝuas flanke de la UNESKO-Komisiono de via lando. Tio instigas min sendi al vi 300 ekz. de la esperanta traduko de „Rekomendoj pri Edukado por Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj". Tiu UNESKO-dokumento estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1974. Nun, kiam la agado por paco estas pli urĝa neceso ol iam ajn antaŭe, tiu dokumento estas ege aktuala".

Viktor Falkenhahn
(11. 2. 1903 — 16. 4. 1987)

Ne plu estas inter ni la konata lingvisto, Prof. d-ro Viktor Falkenhahn. Li forpasis la 16-an de aprilo 1987 en Berlin. Profesoro Falkenhahn, slavisto, i. a. specialisto por la litova kaj pola lingvoj, estis membro de la iame Centra Laborrondo Esperanto (kaj poste Centra Estraro de Esperanto-Asocio) ekde 1972. Li, mem entuziasma esperantisto, gvidis dum longa tempo la fakgrupon Interlingvistiko/esperantologio. Per multaj prelegoj, ekspertizoj kaj kelkaj artikoloj li tre helpis al la akceptiĝo de la interlingvistika problemaro en sciencistaj rondoj de GDR. Li estis eksterodinare ĉarma homo, kiu disradiis apartan komprenemon kaj mildon. Multaj junaj sciencistoj dankis al li gravan helpon por la unuaj paŝoj. Ni kondolencas al la familio kaj honore rememoros lin. Okaze de ĉi-tiu malĝoja informo ni atentigas pri du grandaj studoj de la forpasinto:

1. **Sprachwissenschaftliche Betrachtungen zur Rolle und Struktur des Esperanto.** En: der esperantist, 4, n-ro 18/19, 1968, p. 3—11, 17—18.
2. **Zur Frage einer Welthilfssprache. Ein Vergleich der Lerneinheiten im Deutschen und im Esperanto.** En: der esperantist, n-ro 69/60, 1973, p. 10—18.

Letervespero

Okaze de la centjariĝo de Esperanto, la 15-jara „Juna Koro Esperanto-Klubo" aranĝos letervesperon la 25-an de septembro 1987. Ni atendas esperantilingvajn bildkartojn por demonstri al la oficialaj organizaĵoj (al la Urba kaj Departemento Konsilantoro al la Sindikatoj) la disvastiĝon de Esperanto.
Ni bezonas ankaŭ Vian salutkarton!
Skribu tuj! Dankon
Juna Koro, H—8900 Zalaegerszeg, Pf. 263, Hungario

Interparolo kun la prezidanto de la pola parlamento ROMAN MALINOWSKI

LA ALTA PROTEKTANTO DE LA 72-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

D e m a n d o : Sinjoro Prezidanto, kio kaŭzis, ke vi akceptis la honoran protektantecon de la 72-a Universala Kongreso, ĉu vi rimarkis en Esperanto valorojn, kiuj igis vin akcepti la protektantecon?

Respondo: Mi pensas, ke estas multe da valoroj. Doktoro Zamenhof, kreante Esperanton, kiu ja estas lingvo tre simpla, trovis adeptojn en la tuta mondo, li iniciatis ne nur la movadon de lingvouzantoj, sed ankaŭ de la homoj, konsciaj pri la bezono de globskala interkompreniĝo. Ja multajn problemojn de la nuntempa mondo, ne malgrandigante la signifon de iliaj fundamentaj kialoj, kaŭzas manko de kompreniĝo, aŭ de la deziro interkompreniĝi. Mi pensas, ke multe pli pura estus la internacia klimato, se ne ekzistus tiuj problemoj, kiuj rezultas nur el la manko de kompreniĝo. Kiom pli rapide oni povus solvi multajn, komplikajn problemojn de la nuntempa mondo, se ĉiuj politikistoj, ĉiuj homoj sekvus la sintenon de aktiva kompreniĝado. Kaj mi pensas, ke Esperanto kreas globskale, en la skalo de la tuta homaro, la eblecon interkompreniĝi.

Krome — ĉiu nacio, ĉiu ŝtato, havas sian kulturheredaĵon, sed en ĉi tiu kulturheredaĵo enestas parto de la tuthomara kulturo. Mi pensas, ke Esperanto, la agado de esperantistoj — ĉio ĉi kreas ankaŭ la eblecon firmigi en la tuthomara memoro, tiujn valorojn de la kulturheredaĵo de la tuta homaro. La mondo fariĝas pli kaj pli malgranda pro la kreskanta kundependeco, tutmondiĝo de problemoj, kiuj igas pli kaj pli koncentri la komunan atenton sur ilia solvado, ĉar tio apartenas al la intereso de ni ĉiuj. Ekzemple ni menciu pri teknologia sekureco, ekologia sekureco. La unuopaj nacioj, ŝtatoj, landoj alfrontas diversan intensecon de ĉi tiuj aferoj. Estas landoj, en kiuj la grado de la ekologia endanĝerigo estas sufiĉe granda, en aliaj landoj ĝi estas malpli granda, sed ekzistas ankaŭ komuna ekologia endanĝerigo, ĉar ni venenas unuj la aliajn kaj pro tio ni devas kune entrepreni agadon, por forigi la sekvojn, kiuj estas negativaj por la medio kaj ja pli bone estas preventi. El ĉi tiu ideo rezultas i. a. la propono de Wojciech Jaruzelski, anoncita dum la jubilea sesio de UNO, pri la libera transigado de teknikoj, teknologioj, licencoj aŭ aranĝaĵoj en la sfero de la protektado de la medio. Al la komuna intereso apartenas la demandoj de scienc-teknika kunlaboro, aŭ kreo de nutraĵsekureco. Ja i. a. pro ĉi tiuj kaŭzoj en la pola parlamento maturiĝas la ideo pri okazigo de renkontiĝo de la prezidantoj de la parlamentoj el la ŝtatoj-membroj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo por kuraĝe alfronti la eŭropan estontecon. Plifirmigante la komunan heredaĵon ni devas ĉiam pli koncentriĝi sur tio, kio estas komuna por nia kontinento. La saman pensmanieron oni povas rilatigi al ĉiuj regionoj de la mondo. Mi pensas, ke ĉi-koncerne la lingvo Esperanto kaj ĉi tiu socia movado de la homoj dezirantaj realigi altajn celojn, atingi la klimaton de pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro, meritas specialan rekonon.

D e m a n d o : La strebado al kunlaboro konsistigis la vivovojon de Doktoro Zamenhof, kiu samkiel vi naskiĝis en Bialistoko, ĉu ĉi tiu fakto de la deveno el la sama urbo ankaŭ influis vian decidon akcepti la honoran protektantecon?

Respondo: Mi jam diris al la kolegoj, kiam ili venis al mi kun la propono akcepti la honoran protektantecon de la kongreso, ke la ĉefa premiso de la decido enestas en la esenco mem de la E-movado, kiu kreas kondiĉojn por pli bona interkompreniĝo, kunlaboro. Alia premiso estas la fakto, ke ni estas samurbanoj. Mi ne konis lin persone, ĉar mi ne povis koni, sed kun la personeco de Zamenhof mi kvazaŭ kreskis kaj maturiĝis kaj ĉi tiu personeco akompanis min ekde la junaĝo, ĉar li estas tre konata en Bialistoko. Mi po-

vas diri, ke ni ĉiuj estas fieraj pri tio, ke Zamenhof devenas ĝuste el Bialistoko, ni estas fieraj pro la fakto, ke la interkomprenilo, kiun li kreis, fariĝis bono de la tuta homaro.

Demando: La nomo Bialistoko estas bone konata al ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo, sed nur malmultaj scias pri ĝia tempesteca historio. Ĉu laŭ via opinio, Sinjoro Prezidanto, en la historio de Bialistoko estas periodo, pri kiu oni devus scii, aŭ pri kiu vi volus mencii?

Respondo: Mi estas sub la granda impreso de la kruelaĵoj de la II-a mondmilito en Bialistoko, de la mondmilito, kiu kaŭzis grandan tragedion por la getto en ĉi tiu urbo. La getto okupis duonon de la urbosurfaco. En Bialistoko estis multe da poloj juddevenaj. Mi memoras, ke verŝajne en la unua tago de la komenciĝo de la II-a mondmilito estis detruita per bomboj la bialistoka sinagogo. En Bialistoko loĝis tiutempe multe da juddevenaj poloj, kiuj estis kunkreintoj de la bialistoka kotona, lana kaj ĝenerale leĝera industrio. Preskaŭ ĉiujn la faŝistoj neniigis en la getto. Mi memoras ĉi tiun getton. Parolante pri la martireco de la juda loĝantaro ni ofte mencias la varsovian getton, malpli ofte la bialistokan, sed ja tie, en Bialistoko la batalo daŭris plej longe. Tio estis batalo treege heroa. La germanoj eĉ estis devigitaj uzi, mi memoras ĉi tion, tankojn, aviadilojn, por rompi la rezistadon de la defendantoj de la getto. Mi ankaŭ memoras, kion oni rakontis surstrate, tiun lastan taĉmenton de pereontoj, kiuj kun granda determiniteco defendis la getton ĝis la fino. Nu kaj sekve, mi plu memoras, tiujn scenojn, kiam el la getto oni forkondukis homojn, virinojn, maljunulojn, infanojn, kiam oni amasigis ilin ĉirkaŭe de la stacidomo sub la eskorto de armitaj soldatoj kaj hundoj, kaj sekve oni enpuŝis ilin en vagonojn por transportado de brutoj, kaj la transportojn oni sendis al la koncentrejo Treblinka. Ĉion ĉi mi vidis per la okuloj de impresiĝema infano kaj tial ĉio ĉi forte fiksiĝis en mia memoro. Tio ankaŭ estis premiso, kiu igis min akcepti la honoran protektantecon de la kongreso en la 100-jariĝo de la lingvo, kreita de bialistoka kuracisto.

Demando: Tio, kion vi rakontas, ligiĝas kun la tragedio de multaj juddevenaj esperantistoj. En la koncentrejo Treblinka pereis ankaŭ multaj varsovianoj kaj inter ili familianoj de Ludoviko Zamenhof. Ĉu lige kun Zamenhof kaj Bialistoko vi havas iajn atendojn por estonteco?

Respondo: Bialistoko estas ligita kun Zamenhof, mi — kiel persono naskiĝinta en ĉi tiu urbo, kaj honora protektanto de la kongreso — revas pri tio, ke Bialistoko fariĝu mekko por la esperantistoj de la tuta mondo. Pro tio, mi pensas, ke okaze de la kongreso, estus pripensinda, starigo de internacia fondaĵo, kiu efektivigus tie elkonstruon de internacia esperantista centrejo je la nomo de Zamenhof, kio estus omaĝo al la kreinto de Esperanto, tiu centrejo servus al la esperantistaro de la tuta mondo.

Demando: Certe la ideo estas pripensida, tio estus unu el la plej belaj iniciatoj okaze de la 100-jariĝo de Esperanto. La ĝisnuna vojo tra kiu antaŭeniras la E-movado ne estis facila. Multaj esperantistoj opinias, ke en la daŭro de 100 jaroj oni jam devus atingi la plenan tutmondigon de la lingvo...
Respondo: Mi volas diri, ke Esperanto kompare kun aliaj lingvoj estas tre juna lingvo, se ni komparos ĝin kun naciaj lingvoj aŭ kun la lingvoj, kiuj funkcias kiel internaciaj en diplomatio, ĉar ili havas pli longan tradicion. Se ni prenos en konsideron la ekzistoperiodon de Esperanto kaj la movadon, kiun ĝi kreis, tiam — ĉi tiel mi pensas — oni devas paroli pri rapida progreso de Esperanto. Eble iam UNO akceptos Esperanton kiel lingvon, kiu inter kelkaj lingvoj estos oficiala. Mi kredas, ke la vasteco de la medioj utiligantaj Esperanton, povas alkonduki al la rekono de la lingvo ankaŭ en diplomatio, en UNO, en internaciaj organizaĵoj, kiel unu el la laborlingvoj.

Demando: Vi menciis pri UNO, pri rekono en diplomatio, sed por tio oni devus vastigi la instruadon de la lingvo. Esperantistoj jam delonge klopodas enkonduki la lingvon en la lernejojn

por tiamaniere mondskale popularigi ĝin. Kion vi opinias pri tio?

Respondo: Mi estas por la evoluo de multaj aferoj, inter ili ankaŭ de la lingvo Esperanto laŭ tre naturaj mekanismoj. Mi pensas, ke plej multe por popularigi Esperanton, konsiderante ĝian valoron, povas fari la esperantistoj mem. Laŭ mia orientiĝo en Pollando Pola Esperanto-Asocio ne utiligas ĉiujn eblojn por popularigi la lingvon, sed povas esti, ke la sama situacio estas ankaŭ en aliaj landoj. Mi kredas, ke se oni pli vaste utiligus ĉi tiujn eblojn, tiam eble montriĝus pli granda bezono pri la lingvo mem, kaj tiam ni ankaŭ povus atingi la instruadon de la lingvo en lernejoj. Pro tio, ke la enkonduko de la lingvo en la lernejojn devus respondi al iom vasta bezono, kiu unue devas ekesti. Mi opinias, ke la esperantista organizaĵo devus pli vaste konigi sian agadon al diversaj medioj, pli vaste montri la simplecon de la lingvo kaj facilan ellerneblon, la eblojn de rapida interkomunikiĝado en internacia skalo, kontaktojn, kunlaboron. Tio estas faktoro, kiu montras la avantaĝojn de la lingvo kiel komunikilo.

D e m a n d o : En internaciaj kontaktoj tiu interkomunikiĝado plej ofte efektiviĝas sur la ŝtupo de ŝtatistoj, politikistoj, homoj edukiaj, kiuj konas fremdajn lingvojn, sed dume mankas amasa interkomunikiĝado kaj kontaktoj inter la mezaj civitanoj de unuopaj landoj, ekzemple laboristoj, kamparanoj, kiuj ne ĉiam havas tempon por lerni fremdajn lingvojn. Ĉu vi eble iam prikonsideris, Sinjoro Prezidanto, ke — se ekestus la ebleco de libera interkompreniĝado per unu simpla komuna lingvo diversŝtupa kaj globskale, kian signifon ĉi tio povus havi por la atingo de interkompreniĝo, kiun celas la politikistoj?

Respondo: Mi pensas, ke tio kreus pli firman bazon, pli bone povus solvi tiujn problemojn, kiujn kaŭzas la nuntempa mondo, en kiu ja ekzistas la neceso interkompreniĝi kaj kunlabori en ĉiuj sferoj. Mi pensas, ke tiu bezono interkompreniĝi, kunlabori, krei kompreniĝon kaj fidon, kaŭzas ankaŭ tion, ke la internaciaj kontaktoj disvolviĝu ne nur sur la ŝtupo de politikistoj, ŝtatistoj, organizaĵoj, intelektuloj, reprezentantoj de kulturo de unuopaj medioj, sed ke en ĉiam pli alta grado ili estu kontaktoj amasaj, sociaj, de ĉiuj sociaj strukturoj. En ĉi tiu sfero la lingvo Esperanto povas krei tiajn naturajn kondiĉojn de la realigo, de la interkompreniĝo de ĉiuj. Kaj tia bezono en la nuntempa mondo estas, kiel ŝajnas, aparte forta, estas objektiva bezono pro la komuneco de nia sorto.

D e m a n d o : En viaj vortoj, Sinjoro Prezidanto, mi sentas grandan simpation por nia E-movado, kio nin tre ĝojigas. Tre grava por nia E-movado estos la varsovia kongreso, kiu fiksos planojn por la estonta agado, kiajn esperojn vi persone ligas kun ĉi tiu kongreso, kiel la alta protektanto?

Respondo: Mi pensas, ke la renkontiĝo de tiuj ĉirkaŭ 6 mil personoj en Varsovio, la kongreso mem, povas krei pliajn impulsojn por la universaligo de la lingvo, kio kreas la kondiĉojn de pli bona interkompreniĝo, pliajn impulsojn por pli konkreta utiligo de la lingvo en estonteco.

D e m a n d o : Ĉu dum la inaŭguro de la Kongreso vi faros vian paroladon esperantlingve?

Respondo: Mi jam diris al la kolegoj, ke se inter la multaj taskoj mi trovos iom da tempo kaj mi iom lernos Esperanton, tiam mi klopodos fari mian paroladon esperantlingve, sed mi ne promesas.

D e m a n d o : Sinjoro Prezidanto, via nomo estas bone konata al la esperantistaj aŭskultantoj de Radio Polonia pro la multaj intervjuoj kiujn vi donis al nia radiostacio, ĉu do vi volus ion diri rekte al niaj aŭskultantoj?

Respondo: Mi volus direkti al ĉiuj esperantistoj miajn tutkorajn bondezirojn. Mi volus deziri, ke la kongreso, kiu okazos en Varsovio, bone servu al la plua universaligo de la lingvo, kiu kreas globskale la plej larĝajn kaj plej plenajn eblecojn de de interkompreniĝado, kaj ke samtempe ĉi tiu renkontiĝo kontribuu al la kunkreado de la klimato de interkompreniĝo kaj kunlaboro kaj ankaŭ fido en la tuta mondo. Tio estas tre bezonata por forigi

la endanĝerigojn, kiujn la nuntempa mondo portas, sed ankaŭ por krei la klimaton servantan al ĉiuj ĉi agadoj kaj iniciatoj, kiuj estos aparte valoraj por la paca sorto de la tuta homaro.

Intervjuis Andrzej Pettyn

[La intervjuon oni aŭdigis en la E-elsendoj de Radio Polonia la 28-an kaj 29-an de marto 1987.]

In der DDR abonnierbare Esperanto-Zeitschriften

1. Beim Post- u. Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, Übigauer Str. 4, Falkenberg 7900

1.1. „Paco" (Sofia), 6 Hefte, A4, à 16 S., halbjährliche Kassierung 1,80 M (Jahresabonnement 3,60 M!!)
Kommentar: Diese Zeitschrift kostete bis vor kurzem noch über 30 M. Unsere energischen Bemühungen führten zu einer totalen Preissenkung. Werben Sie also für „Paco"! **Best.-Nr. Z 20626** (Organ der Weltfriedens-Esperanto-Bewegung)

1.2. „Scienca Mondo" (Sofia), 4 Hefte, A4, à 34 S., vierteljährliche Kassierung 1,70 M (Jahresabonnement 6,80 M).
Erscheint mit großer Verspätung. Diese Zeitschrift kann ab 1988 nicht mehr beim Verband bestellt werden. Abonnenten für 1986 und 1987 erhalten die fehlenden Ausgaben noch über uns. Für 1988 werden Abonnements bis zum 30. 9. 87 bei obiger Adresse angenommen. **Best.-Nr. Z 20668** (vorwiegend populärwiss. und wissenschafts-politischer Inhalt).

1.3. „Juna amiko" (Budapest), 4 Hefte, A5, à 30 S., Kassierung einmal im Jahr: 9,30 M. **Best.-Nr. Z 0230-1318.** (Jugendzeitschrift, reich illustriert, vielseitig)

1.4. „Budapeŝta Informilo" (Budapest), 12 Hefte, A5, à 24 S., vierteljährliche Kassierung 5,40 M (Ges.-Preis: 21,60 M). **Best.-Nr.: Z 0133-0977.** Diese Zeitschrift wird nicht mehr durch den Zentralvorstand vertrieben (sehr schnelles Informationsmaterial über internationale Veranstaltungen, internationale Esperanto-Bewegung und Anwendung des Esperanto in Wissenschaft u. Technik).

1.5. „Pola Esperantisto" (Warschau), 4 Hefte, A5, à 24 S., vierteljährliche Kassierung 6,10 M (Ges.-Preis 24,40 M). **Best.-Nr.: Z 36885.** (kulturpolitisches und fachliches Organ des Polnischen Esperanto-Verbandes)

1.6. „Homo kaj kosmo" (Zagreb, Jugoslawien), populärwiss. astronomische Zeitschrift, 4 Hefte, A5, 30 S., halbjährliche Kassierung 7,25 M (Ges.-Preis 14,50 M). **Best.-Nr.: Z 99149.**

Diese Zeitschriften können nur bei obiger Adresse bestellt werden, also nicht bei einem Postamt. Die Bestellungen müssen jeweils bis zum 30. 9. des Vorjahres vorliegen. **Bestellungen für 1988** müssen also **bis zum 30. 9. 1987** in Falkenberg vorliegen.

2. Folgende Zeitschriften können bei jedem Postamt der DDR bestellt werden:

2.1. „Hungara Vivo" (Budapest), 4 Hefte, A4, 40 S., Kassierung zweimonatlich 2,20 M (Ges.-Preis 13,20 M). **Best.-Nr.: 200824** (hervorragende ungarische kulturpolitische Zeitschrift mit Beiträgen über theoretische Probleme der Esperanto-Bewegung, Esperanto-Literatur).

2.2. „der esperantist" (Berlin), 6 Hefte, A5, 24 S., Kassierung halbjährlich à 0,90 M (Ges.-Preis 1,80 M). **Best.-Nr.: 7928** (Organ des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR).

3. Folgende Zeitschriften können nur direkt beim Esperanto-Verband (O.-Nuschke-Str. 1, Berlin 1080) bestellt werden:

3.1. „Starto" (Prag), 6 Hefte, 24 S., A5, Preis 8 M. Erscheint seit 1986 erneut (Organ des Tschechischen Esperanto-Verbandes).

3.2. „Esperantisto Slovaka" (Poprad), 4 Hefte, 16 S., A4, Preis 8 M (Organ des Slowakischen Esperanto-Verbandes, inhaltlich vielseitig).

3.3. „Bulgara Esperantisto" (Sofia), 12 Hefte, 16 S., A4, Preis 15 M (Organ des Bulgarischen Esperanto-Verbandes).

4. „Saksa Kuriero" (Bezirksvorstand Leipzig), 6 Hefte, 8 S., A5, Preis pro Heft 1,00 M, aber 6 Hefte (also Vollabonnement) nur 5,00 M. Eine vielseitige, grafisch sehr gut gestaltete kleine Zeitschrift. Gute Ergänzung zu „der esperantist". Bestellbar bei Literatura Servo de GDREA Leipzig, p. k. 713, Leipzig 7010. Dort erhalten Sie weitere Abonnementsinformationen für diese Zeitschrift.

Annahmeschluß für Abonnements der Zeitschriften 3.1. — 3.3. ist der 30. November des Vorjahres, also für 1988 der 30. Nov. 1987.

Kelkfoje en televidaj programoj de GDR

De la 13a ĝis 15a de marto 1987, ĝuste kiam okazis la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, la televidaj programoj de GDR enhavis „Esperantan komponenton". Denove (post la filma kontribuo pri la 71a Universala Kongreso 1986 en Pekino), la stacio emisiis programojn pri Esperanto. La 13an de marto en la dua programo, nome 6minutan tre inteligente redaktitan kontribuon en la kadro de la „kultura magazino" kun multaj informoj kaj kelkaj intervjuoj pri Esperanto. Parolis la sekretario de GDREA, d-ro sc. Detlev Blanke, la kunlaboranto de la Centra Lingvistika Instituto de la Akademio de Sciencoj de GDR, d-ro Ronald Lötzsch. La moritaton de Mackie Messer (Mek Tranĉilo) en Esperanto kantis Klaus Ebert. Wera Blanke (artista

nomo Wera Paintner) prezentis proverbojn en Esperanto kaj ties tradukojn kaj ankaŭ estis la parolistino de la komentoj. Entute tre efika kontribuo. Ĝis nun la plej longa en televida programo de GDR. Ĝi estis ripetita sabaton antaŭtagmeze.

Krome, lige al IFER'87, la novaja redakcio „Aktuala Kamero" emisiis sabaton, la 14an, kaj dimanĉon, la 15an de marto, 1,5minutan progrometon pri IFER'87, denove kun bazaj informoj pri Esperanto kaj kun scenoj el la solena programo de IFER de la antaŭtagmeza sabato. Ĉi-tiun sendaĵon, pro ripetoj sabate kaj dimanĉe en la 1a kaj 2a programoj, oni povis rigardi entute 5foje.

Urania-prelego

En la prelego-centro de la sciencpopulariga asocio „Urania" en Dresden, d-ro Detlev Blanke prelegis la 5an de februaro 1987 antaŭ 60 personoj pri la 100jara Esperanto.

El la vivo de GDREA

Prelego antaŭ Scienca Konsilantaro

La 20an de februaro 1987 d-ro Detlev Blanke prelegis antaŭ la Scienca Konsilantaro pri Fremdaj Lingvoj ĉe la Ministerio de Aferoj de Altlernejoj kaj Faklernejoj. Li traktis la temon „Esperanto en scienco kaj praktiko" kaj informis ankaŭ pri la ĉefaj rezultoj de la 71a UK en Pekino. La Konsilantaro diskutis kaj akceptis rekomendon oferti Esperanton kiel elekteble lerneblan lingvon en universitatoj kaj altlernejoj de GDR, kondiĉe, ke ekzistos intereso kaj kompetentaj lektoroj.

Kontribuo por pedagogoj

La GDR-eldonejo „Der Kinderbuchverlag Berlin" 1986 eldonis antologion de traktajoj pri la porinfana kaj porjunulara literaturo: „Schauplatz. Aufsätze zur Kinder- und Jugendliteratur und zu anderen Medienkünsten". Berlin 1986. 110 p. La volumon redaktis Joachim Schmidt. En ĝi ankaŭ enestas studo de Detlev Blanke „Fast 100 Jahre: das Esperanto, und jetzt auch im Kinderbuch", p. 129 — 134. (Preskaŭ 100 jarojn: Esperanto, kaj nun ankaŭ en la infanlibro).

Ne malofte en la radio-stacio

Pli kaj pli ofte oni povas aŭskulti radiointervjuojn pri Esperanto en GDR. Tre gravaj estis unuhoraj intervjuoj de DT64 pri SEFT'86 (Carola Lehr), 20. 12. 1986 kaj de Radio DDR, stacio Leipzig, kun Sabine kaj Joachim Schulze, 19. 2. 87 (unuhora), kiu estis transprenita en la tutrespublikan programon.
Krome menciindas intervjuo de Radio DDR (pionira magazino), 28. 10. 86, kun Monika Ludewig, Radio DDR Bernburg, 1. 12. 86, kun Siegfried Wagner kaj 1. 2. 87 intervjuo de Radio DDR, stacio Cottbus, kun Margot Manke kaj Christel Kraus.

Eisenach-a grupo — dek jaroj

Dum decembro de la jaró 1976 15 gelernintoj fondis post fino de unua E-kurso la grupon Eisenach [ajzenaĥ]. La 10an datrevenon de tiu-ĉi okazaĵo la eisenach-anoj festis la 6an de decembro 1986 en la klubejo de Kutlurligo. Ankaŭ ĉeestis la fondinto de la grupo kaj honora prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA Erfurt, Werner Habicht el Waltershausen.
La grupestrino Ruth Partecke raportis pri nia laboro. Werner Habicht rememorigis pri la eminenta signifo de Esperanto por popola amikeco kaj por konservado de la mondpaco. A. Höpfner lumbildperlegis pri turismaj E-tagoj en Slovakio (TUSE).
Malgranda ekspozicio montris grupkronikon, tutmondajn leterinterŝanĝojn k. t. p.

Laŭ A. Höpfner

Distingoj per Johannes-R.-Becher-medaloj

Dum la IVa Centra Delegita Konferenco de GDREA, la 4an de aprilo 1987 en Leipzig per la Johannes.-R.-Becher-Medalo estis distingitaj jenaj esperantistoj:
En arĝento: Michael Lennartz kaj Fritz Wollenberg
En bronzo: Manfred Arnold kaj Horst Jasmann
Ni kore gratulas.

Distingo per la Honorinsigno de Kulturligo

Dum la IVa Centra Delegita Konferenco de GDREA, la 4an de aprilo 1987 en Leipzig, per la Honorinsigno de Kulturligo estis distingitaj jenaj esperantistoj:
En bronzo: Peter Bartos, Klaus-Dieter Dungert, Paul Linke, Christian Papenmeier. Edith Plümecke, Dr. Hans Rogazewski, Rosen Trenner, Fred Valtin.
En arĝento: Rolf Beau, Michael Behr, Hans-Joachim Borgwardt, Karl Raabe.
En oro: Werner Habicht, Ludwig Schödl kaj Erich Würker.
Ni kore gratulas.

Honorinsigno de GDREA

Dum ĉi-tiu jaro tuta aro da meritplenaj esperantistoj ricevis la Honorinsignon de GDREA pro elstara agado realige al la celoj de la asocio. Jen la listo:
— Sigrid Engel (17. 1. 1987 en Rostock)
— Eduard Plesar (21. 2. 87 en Karl-Marx-Stadt)
— Heinz Heimann (21. 2. 87 en Karl-Marx-Stadt)
— Dr. Frank Nitzsche (21. 2. 87 en Karl-Marx-Stadt)
— Ruth Ehrlich (21. 2. 87 en Karl-Marx-Stadt)
Dum la IVa Centra Delegita Konferenco de GDREA, la 4an de aprilo 1987 en Leipzig la distingon ricevis:
— Gerhard Brähmer, Dr. Rudolf Fiedler, Prof. Dr. sc. Peter Held, Elisabeth Boller, Dr. Giso Brosche, Kurt Güse, Willy Hamann, Christel Kraus, Brigitte Raabe, Ingrid Schödl, Sabine Schulze, Joachim Schulze, Günter Walz, Achim Zettier. Ni kore gratulas.

Centra Estraro de GDREA

Forpasis Gerhard Raupach

La iama tre aktiva laborista esperantisto, membro de GDREA, Gerhard Raupach el Burkhardtsdorf/Erzgebirge, forpasis komence de marto en la aĝo de 77 jaroj. Li estis dum multaj jaroj aktiva partia funkciulo kaj partoprenis la plej multajn renkontiĝojn de iamaj LEA-membroj, kiujn organizis nia aso-

cio. La perdo de Gerhard Raupach estas tre doloriga. Ĉiuj, kiuj konis lin, sciis pri la politika engaĝo, lia honesta esperantisteco kaj afableco. Ni ne forgesos lin.

CE de GDREA

Ni kore gratulas al

— la membro de la Centra Estraro de GDREA, d-ro Ronald Lötzsch kaj lia edzino Gesine en Berlin okaze de la geedziĝo, la 25an de aprilo 1987,
— la membro de la Centra Estraro de GDREA, Ingrid Schödl kaj d-ro Klaus Mewes pro geedziĝo la 16an de majo 1987.

Ni funebras pro la forpaso de

— la iama laborista esperantisto Erich Leissner (2. 1. 1987) el Leipzig
— la iama laborista esperantisto Herbert Kinzel (31. 3. 1987) el Delitzsch
— d-ro József Mátéffy, iama prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio kiu forpasis la 4an de novembro 1986 en la aĝo de 85 jaroj

Dua eldono de „Esperanto und Wissenschaft"

Fine de 1986 aperis la dua eldono de Detlev Blanke: Esperanto und Wissenschaft (Zur Plansprachenproblematik), Kulturbund der DDR, Esperanto-Verband, Berlin 1986, 88 p.
La kajero estas represo de la unua eldono kaj ankaŭ enhavas kontribuojn de d-roj Till Dahlenburg kaj Martin Schüler.
La ŝanĝoj koncernas la antaŭparolon, kiu nun resumas la ĉefajn atingojn en la evoluo de la scienc-teknika apliko de Esperanto inter 1982 kaj 1986.
Krome sur la lasta paĝo estas presita la germana traduko de la teksto de la UNESKO-rezolucio. La kajero kostas 6 markojn por GDR-anoj. Eksterlandanoj ĝin aĉetu ĉe Universala Esperanto-Asocio. Pri la unua eldono aperis kelkaj recenzoj, i. a. en la revuo Esperanto 6/1983; Sprachwissenschaftliche Informationen (Akademio de GDR) 6/1983, p. 146 ĝis 14.; Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung, 4/1986, p. 490 — 491. Ni ankoraŭfoje represas la enhavoliston de la broŝuro:

Vorwort
1. Plansprachen
1.1. Der Terminus „Plansprachen"
1.2. Zur Klassifikation von Plansprachen (projekten)
1.3. Plansprachen in der Praxis (außer Esperanto)
1.3.1. Volapük
1.3.2. Latino sine flexione
1.3.3. Ido
1.3.4. Occidental-Interlingue
1.3.5. Interlingua
1.3.6. Zum Schwellenwert
1.4. Einige Gründe für Vorurteile gegenüber Plansprachen
1.5. Anmerkungen zu Kapitel 1
2. Interlinguistik — Forschung und Lehre
2.1. Drei Aspekte
2.2. Interlinguistik und interlinguistische Forschungen
2.2.1. Der Terminus Interlinguistik
2.2.2. Interlinguistische Forschungen
2.2.3. Ein internationales linguistisches Experiment
2.2.4. Interlinguistik und Esperanto als Forschungsgegenstand und Lehrfach an Hochschulen
2.2.4.1. Forschungsgegenstand
2.2.4.2. Lehrfach und wissenschaftliche Aktivitäten an Hochschulen
2.2.4.3. Bisherige wissenschaftliche Aktivitäten auf dem Gebiet der Interlinguistik in der DDR
2.3. Anmerkungen zu Kapitel 2
3. Die Plansprache Esperanto
3.1. Skizze der Esperanto-Grammatik
3.1.1. Alphabet/Aussprache
3.1.2. Morphologie
3.1.3. Wortbildung
3.2. Zur linguistischen Charakterisierung des Esperanto
3.3. Zur praktischen Anwendung des Esperanto
3.4. Anmerkungen zu Kapitel 3.1. — 3.3.
3.5. Pädagogischer Wert des Esperanto-Unterrichts (Till Dahlenburg)
3.5.1. Bildungsökonomischer Aspekt
3.5.2. Lernpsychologischer Aspekt
3.5.3. Gesellschaftspolitischer Aspekt
3.5.4. Anmerknugen zu Kapitel 3.5.
4. Die Plansprache Esperanto in Wissenschaft und Technik
4.1. Wissenschaftl.-technische Information und Dokumentation und die Sprachbarriere
4.1.1. Quantum an Informationen
4.1.2. Informationen und Sprachen
4.1.3. Wissenschaftler und Sprachkenntnisse
4.1.4. Arbeitszeit für Informationsauswertung
4.1.5. Ausnutzungsgrad vorhandener Informationen
4.1.6. Weitere die Informationsauswertung erschwerende Faktoren
4.2. Anwendung des Esperanto in Wissenschaft und Technik
4.2.1. Bedeutung einer Plansprache für Wissenschaft und Technik
4.2.2. Fachterminologie in Esperanto
4.2.2.1. Die linguistischen Voraussetzungen
4.2.2.2. Merkmalforderungen an den Fachterminus
4.2.2.3. Entstehung und Registrierung von Fachtermini
4.2.2.4. Zur Situation der Esperanto-Fachwörterbücher
4.2.2.5. Fachwerke, Fachorganisationen und wissenschaftliche Veranstaltnungen in Esperanto
4.2.3.1. Entwicklungslinien
4.2.3.2. Fachveröffentlichungen
4.2.3.3. Esperanto-Fachorganisationen
4.2.3.4. Internationale Fachveranstlatungen
4.2.4. Fachliteratur In Bibliographien, Bibliotheken und Archiven
4.3. Anmerkungen zu Kapitel 4.1. — 4.2.
4.4. Esperanto und elektronische Datenverarbeitung (Martin Schüler)
4.4.1. Esperanto als Instrument der EDV
4.4.2. Esperanto als Objekt der EDV
4.4.3. Esperanto als Objekt und Instrument der Datenverarbeitung

4.4.4. Organisatorische und publizistische Aktivitäten
4.4.5. Anmerkungen zu Kapitel 4.4.
5. Fachtexte in Esperanto (Beispiele)
6. Esperanto im Kulturbund der DDR
7. Anhang
7.1. Fachwörterbücher in Esperanto (Auswahl)
7.2. Vorlesungstexte der Universitäts-Sommer-Kurse in Liège, 1972 — 1978 (Auswahl)
7.3. Vorlesungen der Internationalen Sommer-Universität 1950 — 1980 (Auswahl)
7.4. Fachzeitschriften in Esperanto (Auswahl)
7.5. Nationalsprachige Esperanto-Wörterbücher (Auswahl)

Tutpaĝa intervjuo pri Esperanto

Joachim Schulze intervjuis la sekretarion de GDREA pri Esperanto sur tuta paĝo de la distrikta partia organo „Leipziger Volkszeitung", la 28./29. 3. 87. Tiu jurnalisme bone farito kaj neignorebla grandega kontribuo vekis multan atenton pri Esperanto.

El la vivo de GDREA

Metiejaj Kulturtagoj de junaj esperantistoj '87

La „Metiejajn Kulturtagojn" — okazintaj de la 25-a de februaro ĝis 2-a de marto 1987 en Halle — partoprenis 90 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando. La aranĝo okazis en la junulara klubejo „Werner Lamberz" en la nova kvartalo de Halle, Silberhöhe. La aranĝo okazis laŭ la spertoj de la „Metiejaj Kulturtagoj" 1986. Temis pri centra internacia junulara aranĝo, kiun organizis Distrikta Estraro Halle de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR kunlabore kun Distrikta Estraro Halle de Libera Germana Junularo (FDJ). Enhave kaj finance subtenita ĝi estis fare de Centra Estraro de GDREA kaj de Distrikta Estraro Halle.

La junaj partoprenintoj diligente prepariĝis en jenaj laborgrupoj: „plastika arto" (linoleŭma gravurado kaj litografio), „figura arto" (teatrajo, kabaretajo, dancgrupo), „muziko" (kantoj kaj instrumentajoj), „literaturo kaj poezio" (verkado, tradukado kaj recitado de peomoj kaj prozajoj) kaj „fotografado".

Merkredon vespere kreiĝis la koncernaj laborgrupoj. Jaŭdo ĝis sabato antaŭtagmeze ĉiuj partoprenintoj klopodis pri aktiva kunlaboro en la respektivaj laborgrupoj, helpe de la artestroj. Laŭ propra elektro ni vizitis jaŭdon vespere koncerton de la orkestro „Musica Inventa" en la kulturdomo „Heinrich-und-Thomas-Mann" aŭ la opereton „Der Vogelhändler" (La birdvendisto) en la Landa Teatro Halle. Sekvonttage universitataj studentoj — membroj de ensemblo „Solidarität" prezentis rusajn kaj ĉiliajn (popol)-kantojn. Sabaton posttagmeze ni vizitis la historian salfaristan muzeon „Saline". Fakuloj demonstradis la iaman salproduktadon. Poste ni aŭskultis la magnetofonan gvidadon en la Händel-Muzeo, tradukita en Esperanton.

Sekvis la vespero: la vera kulmino de nia aranĝo. Pri la temo „Juna arto en la 100-jara lingvo" la junaj laborgrupanoj prezentis la plej bonajn rezultojn de sia kreado, honorigita per multe da (ap)-laŭdo de la spektantoj. Ankaŭ kelkajn gastojn ni havis, inter ili estis profesorino d-rino Gertrud Sasse, honora prezidantino de Kulturligo, reprezentanto de la kultura sekcio de la koncilio Halle kaj s-ro Frank Stransky, sekretario de Distrikta Estraro de Kulturligo Halle, reprezentanto de la distrikta laborrondo filmkluboj kaj diversaj artistoj. Fine de la plensukcesa programo la plej aktivaj partoprenintoj estis premiitaj.
Dimanĉe ni ekskursis niaelekte al Naumburg aŭ Bernburg. Tie akceptis nin la vicurbestro, tra la historian urbocentron gvidis la urba ĉefarkitekto. Post la vespermanĝo sekvis forumo: „Kiel ni povas kontribui al la konservo de la paco?" kaj adiaŭa vespero.
Dum la aranĝo oni povis rigardi filatelian ekspozicion. Niaopinie la renkontiĝo plensukcesis. Ni tre dankas la organizan komitaton pro la engaĝiĝo. Kun ĝojo ni atendas la „Metiejajn Kulturtagojn" '88.

Sylvia Lassika

17a plenkunsido de la CE de GDREA

La rigora vintro ĉi-jare devigis GDREA ŝovi la 2-tagan plenkunsidon de sia Centra Estraro, planitan por januaro en Frankfurt/Oder, al duontaga dum marto (7. 3. 87) en Berlin. La membroj diskutis la rezultojn de la subdistriktaj kaj distriktaj elektoj, traktis problemojn de la preparo de la IVa Centra Delegita Konferenco en Leipzig, pri aranĝoj lige al la jubilea jaro kaj aŭskultis informojn pri la prepariĝo al la jubileaj kongresoj en Pollando.

Zamenhof-festo 1986

De 12. ĝis 15. 12. 86 denove okazis la tradicia Zamenhoffesto de Bernaŭaj geesperantistoj. La renkontiĝo okazis en la junulargastejo „Hellmühle" inter Biesenthal kaj Lanke. Entute partoprenis 59 junuloj, inter ili sep hungaroj, du bulgaroj kaj 20 el Ĉeĥoslovakio.
Al la programo apartenis la interlonatiĝa vespero kun diskoteko, Zamenhof-vespero, diapozitiva prelego prezentita de Sandor Hideg el Hungario kaj la donacodisdono fare de „Sankte Nikolao".
Do, revidon ĝis fino de la jaro, verŝajne de 11. — 14. 12. 87, kiam denove okazos Zamenhofa festo.

Laŭ Ingo Fischer

10-a ITREE

La jam 10a Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj de Ercmontaro okazos de la 10a ĝis 14a de septembro 1987 en Boži Dar (ČSSR), proksime de la limtranspasejo (GDR) Oberwiesenthal. La partoprenkotizo estas 200 kronoj. Informojn donas Rudolf Eichler, 9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Str. 21.

Amikeca renkontiĝo kun mongoloj

1986 en septembro mi feriis en Mongola Popola Respubliko. Alveninte en Ulanbator mi intencis viziti la amikon de s-ro Borgwardt, s-ron Ĥorloo Davaadoo, kies adreson mi havis. Sed vane mi serĉis lian loĝejon, ĉar tiu adreso estis lia poŝtkesta numero. Feliĉe mi ankaŭ havis la nomon kaj la telefonan numeron de alia mongola e-isto, kiu estis anoncitaj en „der esperantist". Telefoninte kun li mi renkontiĝis kun mia nova amiko Batzajaa. Li havigis al mi la loĝadreson de Ĥorloo Davaadoo. Komune ni vizitis Horloo-n kaj ties familion. Priparolante diversajn aferojn pri la mongola E-movado ni pasigis agrablan vesperon en tiu ĉi gastama familio. Tiu ĉi renkontiĝo kun mongolaj amikoj pliriĉigis mian restadon en tiu fora azia lando. Ĉiam denove estas grandioza travivajo, se oni per la internacia planlingvo Esperanto povas konatiĝi kun amikoj en la tuta mondo dum siaj vojaĝoj. La bela Mongolio kun siaj senlimaj vastaj pejzaĝoj kaj siaj afablaj homoj, tamen precipe la amikecaj renkontiĝoj kun mongolaj e-istoj, ĉiam restos en mia memoro.

Manfred Goldenbogen

Prelego en la universitato Halle

La 18an de junio 1986 d-ro Blanke prelegis antaŭ ĉirkaŭ 30 lingvistoj de la universitato Halle pri bazaj problemoj de interlingvistiko.

El eksterlando

Internacia Danuba Remado

De la 17a ĝis 30a de aŭgusto 1987 ŝatantoj de akva turismo, kiuj parolas Esperanton povas partopreni la bulgaran parton de la 32a Internacia Danuba Remado (IDR). La remado longa 421 km komenciĝos de urbo Vidin kaj finiĝos ĉe la fermo de ĝi en urbo Silistra. Oni dormos en propraj tendoj, kiujn instalas la partoprenantoj en interesaj pitoreskaj lokoj. Estos vizitataj vidindajoj, spektado de folkloraj programoj, filmoj kaj diapozitivoj. Ne mankos renkontoj kun lokaj geesperantistoj. La esperantistoj dum IDR daŭrigos pli intense la propagandon de Esperanto inter la 400 partoprenantoj, kiu estas farata de du jaroj. Tolaj sloganoj, flugfolioj, broŝuroj, poŝtkartoj, glumarkoj kaj etikedoj memgluebla estos uzataj dum la informado. Ilin disponigos landaj Esperanto-asocioj en apuddanubaj landoj.

La Esperanto-grupon en IDR organizas kaj financas ĉiujare Bulgara Esperantista Asocio pere de sia turista sekcio, en kunlaboro kun Bulgara Turista Asocio kaj Monda Turismo. Estas ebleco, ke iuj partoprenu la aranĝon per propra aŭto, veturante paralele de la Danubo.

La dezirantoj partopreni la remadon devas skribi al: Internacia Danuba Remado, PK 45, BG—1090 Sofia aŭ al la faka turisma aŭ sporta organizo, kiu okupiĝas pri IDR en la koncerna lando.

KSA-seminario en Hungario

Inter la 30-a de marto kaj 3-a de aprilo 1987 kunvenis en Gödöllö, ĉ. 30 km for de Budapeŝto, 30 gejunuloj el kvar landoj, nome el Bulgario, Pollando, GDR kaj Hungario. Dum tiuj tagoj estis aranĝita seminario de la Komisiono de la scienca aplikado de Esperanto, kiu apartenas al TEJO. La partoprenintoj, kiuj plejparte estis gestudentoj, sekvis atenteme plurajn tre interesajn prelegojn. Tiuj temis unuavice pri naturprotektado, entomologio kaj pri TEJO mem. Sed ankaŭ estis priparolataj temoj kiel „sciindajoj pri Japanio", ŝako, komputado kaj humuro. Dum posttagmezo okazis ekskurso al Budapeŝto, kie ni inter alie vizitis la oficejon de HEA. Vespere ni ĉiam havis diversajn diskutojn kaj aranĝis multajn interesajn komunajn ludojn. La seminario postlasis por ĉiuj gejunuloj fortan impreson.

Ronald Schindler

Aperis ĉe HEA

Hungara Esperanto-Asocio lastatempe eldonis:

— István Gáll: Obsedita de l'suno. Budapest, 1986, Romano. 184 p.
— Attila József: Urboranda nokto. Budapest, 1986, poemoj, 141 p.
— Julio Baghy: Hura! Budapest 1986, dua eldono de la fama originala romano, 425 p.
— Enciklopedio de Esperanto. 3a eldono, Budapest 1986, 600 p.

[Ni recenzas nur duekzemplere ricevitajn verkojn]

Ekspozicio de Fajszi

En la Hungara Nacia Biblioteko okazis oficiala ekspozicio de Esperantaj libroj de 16. 3. — 11. 4. 1987 sub la titolo „La vojo de Esperanto-libro en Hungario". Temas pri elekto el la riča kolekto de Károly Fajszi el Budapest, kies Esperanto-kolektaĵo ampleksas preskaŭ 20 000 bibliografiajn unuojn, inter ili pli ol 7 000 libroj kaj 3 000 binditaj jarkolektoj. La tuta valorega privata kolekto ekde 1982 estas ŝtate protektata kaj troviĝas sub la eŭspicio de la hungara kultura ministerio. En preparo troviĝas moderne aranĝita katalogo, kiu registras pli ol 5 000 titolojn de la kolekto de la nelacigebla kolektanto.

Ciu esperantisto estas alvokata sendi revuojn librojn kaj aliajn esperantaĵojn al Károly Fajszi (Budapest VI, Népköztársaság utja 27, H—1061), tiel servanta al la pligrandiĝo de unika kolektaĵo, kiu jam havas grandan signifon por la scienca studado de Esperanto.

FREINET-instruistoj

La jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj (Freinet-pedagogio) okazos en Poznan (Pollando) de la 12a ĝis la 22a de julio 1987. Oni sin turnu al: Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F—37540 St-Cyr-sur-Loire (Francio) aŭ al: Euzebiusz Drzewiecki, ul. Swit 2A m7, 60—375 Poznan (Pollando).

Renkontiĝoj en Dudince/ČSSR

Ili jam estas tradiciaj. La sekva okazos de 30-a de aŭgusto — 5-a de septembro 1987. Sed oni povas resti ankaŭ pli longe. La semajna restado kun 6 tranoktoj kostas nur 150 Kčs (= 50 M). Kuirejo estas senpage je dispono. En la programo estas banado en saniga, termalakva baseno, interesaj ekskur-

soj kaj prelegoj pri la vivmedio- kaj naturprotektado, pri vegetarismo, makrobiotiko, naturkonforma senvianda vivmaniero, pri jogo kun ekzercadoj. Partoprenintoj de ekspedicioj al Pamiro kaj Himalajo rakontas pri siaj spertoj, pri la Hunza-popolo,en kiu estas eĉ 150-jaraĝaj homoj. — Ciuvespere kultura programo, lumbildoj, Esp.-filmoj, ktp. Informojn petu, aliĝilojn adresu al: Ernesto Váňa, CS—962 71 Dudince, Slovakio, ČSSR

Naturprotektantoj en Ĉeĥoslovakio

Baza organizo de Ĉeĥoslovaka Asocio de Naturprotektantoj en Žilina serĉas kontaktojn kun similaj organizoj [esperantistaj kaj neesperantistaj] en aliaj landoj. Oni planas reciprokajn vizitojn en protektataj regionoj kaj naturrezervejoj kaj interŝanĝon de spertoj. Kontaktojn kun neesperantistoj peros esperantistoj — interpretistoj el unuopaj landoj. Skribu al: Inĝ. Marián Magdolen, Pri Rajčianke 42, 010 01 Žilina, ČSSR

Abstinencula Societo?

Kun celo organizi esperantistan abstinenculan societon ni serĉas esperantistojn, aktivajn batalantojn kontraŭ alkohol- kaj nikotinuzado. Ni serĉas seriozajn kontaktojn kun abstinenculaj organizajoj de via lando pere de esperantistoj. Dankon! Skribu al: Eugeno S. Perevertajlo, SU—700 000 Počtamt ab/k 140, Taŝkento, Uzbekio, USSR

Pri la „muzeo de paco kaj solidareco" en Samarkand/USSR

La laborista veterano, neesperantisto, Richard Nehring, ofte vizitis Sovetan Union, kaj 1986 ekhavis kontakton kun la tre aktiva „Klubo de la internacia amikeco", kiu uzas kelkajn lingvojn kaj estas animata de esperantistoj. Ĝia konata gvidanto estas Anatoli Ionesov, membro de la urba estraro de Komsomolo. Laŭ la materialoj ricevitaj de s-ro Nehring ni kompilis jenan raporteton pri kelkaj lastatempaj aktivajoj de la tre aktiva klubo.

La „Klubo de la internacia amikeco Esperanto" estas ligita al la urba estraro de la Lenina Komsomolo en Samarkand kaj jam havas bonan internacian reputacion. La klubo agas laŭ la slogano „Esperanto servas al la paco". Aparte menciindaj estas la ekspozicioj de la klubo. Dum la Internacia Jaro de la Paco 1986 ĝi organizis i. a. ekspoziciojn kun la temoj „paco — espero de la planedo" kaj „Ernst Thälmann — prezidinto de KPD". Multaj esperantistoj kaj aliaj civitanoj de GDR, inter ili ankaŭ Richard Nehring, sendis valoran materialon. La klubanoj ankaŭ produktis filmon kun la titolo „dum ankoraŭ batas la koroj", sub la reĝisorado de Anatoli Ionesov. La klubo organizis multajn aranĝojn kun pripacaj temoj. Kiam Erich Nehring dum septembro 1986 restadis en Samarkand, laŭ invito de la Komsomolo, li partoprenis en 45 porpacaj mitingoj, forumoj kaj aliaj aranĝoj, kaj — kiel neesperantisto reganta la rusan lingvon — povis observi de proksime la valoran agadon de la klubanoj. Por la jaro 1987 la klubo organizis du pluajn ekspoziciojn, pri „misuzo de alkoholo kaj nikotino" kaj „la tero verdiĝu kaj floru" kaj nepre bezonas materialojn (la adreson vidu sube).

Aparte menciinda estas unika iniciato de la klubo: la fondo de „Muzeo de paco kaj solidareco". Ĉi tiu muzeo fondiĝis la 31an de decembro 1986 kaj kolektas ne nur materialojn pri la temo el la pasinteco sed aparte el la nuntempo.

Jam la muzeo disponas pri pli ol 1 500 eksponaĵoj el 40 landoj. Por ĉi-tiu muzeo, ŝajne unika en la mondo, kaj por la aliaj aktivajoj menciitaj, la klubo nepre bezonas materialojn kaj ĉiuspecan subtenon. Do helpu ankaŭ vi kaj skribu al: **USSR/Uzbeka SSR, 703 000 Samarkand, P. O. Box 76, Interklubo „Esperanto", Anatoli Ionesov.**

Bulgara partia kongreso menciis la Esperanto-Asocion

Raporto de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio al la Dektria Partia Kongreso. Sofia: Sofia Pres 1986, 138 p.

En la traduko de Petko Arnaudov nun estas havebla la esperantlingva verko de la grava raporto, kiu resumas la atingitan staton de la bulgara socio kaj skizas la taskojn ĝis 1990. Sur paĝo 103 ni legas, lige al Esperanto, „La komitatoj por bulgara-sovetia amikeco, la Movado de la bulgaraj virinoj, la komitatoj por paco, la Organizajo por akcelado al la defendo, la Movado por sobreco, **la Bulgara esperantista asocio,** la sciencaj kaj belartkreaj asocioj kaj aliaj disvolvis celdirektitan kaj fruktodonan agadon por pli kompleta kontentigo de la multflankaj sociaj kaj socialaj interesoj de la bulgaraj civitanoj. Estes necese, ke ankaŭ estonte ili ĉiuj konforme al la objekto de sia agado, per siaj specifaj formoj kaj rimedoj de laboro serĉu kaj plenumu sian rolon en la batalo por efektivigo de la scienc-teknika revolucio, por la socialismo konstruo de la lando, por evoluo de la socialisma personeco."

D. B.

Pri la nova estraro de VPEA

La 25an de oktobro 1986 en Hanojo okazis amasa renkontiĝo, ĉe kiu estis prezentita la nova Centra Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kies prezidanto estas la poeto DAO ANH KHA.

Reprezentantoj de la Vjetnama Packomitato, kune kun tiuj de diversaj popolorganizoj kaj ŝtatoficoj ĉeestis la kunvenon.

La nova estraro de VPEA faris revuon de siaj aktivecoj, aldonis sugestojn al la asocia projekto por la venonta tempo kun la celoj disvastigi Esperanton en nia lando (precipe en Hanojo kaj en Urbo Hô Chi Minh); samtempe plani aktivecojn de VPEA lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto okazonta en 1987 en Varsovio, ĉefurbo de la Popola Respubliko de Polujo.

Konsisto de la nova Centra Komitato de VPEA

Prezidanto:

— Dao Anh Kha (jurnalisto kaj poeto)

Vic-Prezidantoj:

— Prof. Hoang Tuê (filologo, direktoro de la Vjetnama Filologia Instituto)

— Nguyén Duc Quy (publicisto, eks-vicministro pri kulturo)

— Vu Cân (ĉefredaktoro de „La Kuriero de Vjetnamio")

— Lê Tuyêt Thanh (jurnalistino, vicdirektor de la Ofico por Eksteraj Rilatoj de Urbo Hô Chi Minh)

Ĝenerala sekretario:
— Nguyên Dinh Hiên (publicisto, vic-direktoro de la Hanoja Fremdlingva Eldonejo)

Konstanta sekretario:
— Dang Dinh Dam

Komitatanoj:
— Nguyên Hai Trung (verkisto)
— Nguyên Minh Kinh
— Bui Hanh Cân (poeto)
— Vu Thanh Huong (lingvistino)
— Nguyen Nhu Thu
— Trân Dang Khoa
— Chu Trê Giang (inĝeniero)
— Nguyên Van Thinh (pentristo)
[VPEA-INFORMO, 105A Str. Quan Thanh, Hanojo-VSR]

Medioprotektado

Dum la IV-a Centra Konferenco de GDREA inter 87-04-03/05 oni pridiskutis fondon de fakgrupo pri medioprotektado ĉe GDREA. Interesuloj pri natur kaj medioprotektado kaj ekologio, kiuj intencas kunlabori en tia fakgrupo, bonvolu turni sin al: Ronald Schindler, Bardelebenstr. 5, Frankfurt/O., 1200. De tie oni povas ricevi pli da detaloj.

Ronald Schindler

Recenzoj

Canko Murgin: Esperanto-poetoj de Bulgario: Sofio: Bulgara Esperantista Asocio 1985, 65 p.

Murgin ne nur verkas pri historiaj temoj de la Esperanto-movado kaj pri Zamenhof sed ankaŭ pri literaturkritikaj temoj:
BEA elodonis la unuan volumon de planita serio pri la bulgara esperantista poezio, kiu i. a. devus priskribi la „bulgaran skolon" en la Esperanta literaturo. Kaj sendube ekzistas kelkaj rimarkindaj Esperantaj poetoj, kiuj estas bulgaroj. En la unua volumeto de la serio Murgin traktas la kontribuojn de Ĥristo Trikjakin kaj Ĥristo Riaĥovski pri la naskiĝo de la originala Esperanto-poezio en Bulgario (1906). Sekvas portreto de la „unua vera Esperanto-poeto en Bulgario", tiu de Petro Jordanov. La ĉefan enhavon de la broŝuro formas la poeziaj portretoj de Dimitro Zlatarski (pseŭdonimo: Miti), Asen Grigorov (Marin Ljubin), Ĥristo Gorov (Ĥrima) kaj Violin Oljanov (Zefiro). Ili komencis verki inter 1923 — 1937. Bedaŭrinde jam forpasis Asen Grigorov (1985), kiu estas verŝajne la plej talenta el la tri kaj postlasis plej abundan verkaron. Murgin tre bone skizas la personecprofilon de la poetoj, ilin metas en la konkretan socipolitikan agadon de ilia tempo kaj tiel bone reliefigas la motivojn de ilia verkado. Liaj literaturkritikaj eseoj ne elĉerpiĝas ĉe abstraktaj formalaj indikoj kaj interpretoj, sed ĉiam liveras la konkretan socian ĉirkaŭon. Entute, interesaj kontribuoj ĝenerale al literaturkritiko Esperanta kaj aparte al la bulgara Esperanta literaturo.

D. Blanke

Poemaro por Paco. Rotterdam: UEA, 1986, 44 p.

Tre salutindas, ke ankaŭ UEA aktivas en la porpaca agado mondvasta, ĉar konsidere al la nuna danĝera situacio sur nia tero ĉiu kontribuo — eĉ la plej modesta — celanta al la konservado de la paco, estas valora kaj necesa. 1986 UEA eldonis honore al Internacia Jaro de Paco kaj okaze de la 71a UK Poemaron por Paco, kiu laŭ mia opinio denove pruvas, ke la Esperanto-movado pretas al „kunlaboro enkadre de la disvastigado de la ideoj de la paco, malarmado kaj internacia sekureco",[1]) al kiu invitis M. S. Gorbaĉov dum la XXVIIa sovetia partikongreso.
La poemaro estas bone presita 44paĝa kajero, enhavanta 28 poemojn, verkitajn de same multaj aŭtoroj el 16 landoj, de 4 kontinentoj. La kontribuoj elektitaj de juĝantaro el entute 70 proponitaj, ege diferencas laŭ sia enhavo kaj arta kvalito. Ŝokis min la malrealismeco ekzemple de la sendube bonvola brazila esperantisto, kiu opinias ke „. . . ni sukcesus . . ., ke nia trista kaj infera mondo / ŝanĝadu sin al vera Paradizo! . . .", „Se la homaro . . ., / Sukcesus pensi pri graveco via, / Ho, Esperanto, . . ." (paĝo 18). Italo skribis: „Verŝajne ne estas nur hazarda koincido, ke la jaro de paco jus antaŭas tiun de Esperanto. Ĉu?" (14) Male al tio ekzemple W. Auld estas realisma alvokante: „Per la komuna lingvo ni peradu komunajn sentojn pri la homfatalo, . . ." (6) Multaj temoj estis pritraktataj: Hirošimo, la esenco de la paco, la timo, la espero, Kamp David, . . . kaj oni alvokis al la batalo. Kun multaj, sed ne kun ĉiuj esprimitaj opinioj oni povas konsenti. La poemaro donas al ni pridisputindan kaj diskutendan materialon. Jen ĝia ĉefa valoro.
Legante kelkajn verkojn, mi ne povis havi la impreson, ke ili estis skribitaj por esti skribitaj. Milfoje diritan oni ripetis unu fojon pli. Sed ankaŭ aŭtoroj, kiuj havas novajn proprajn ideojn kaj samtempe kapablas esprimi ilin bellingve kaj konvinke, prezentiĝas en la kajero.

[1]) Politischer Bericht des ZK der KPdSU an den XXVII. Parteitag der KPdSU, Progreß-Verlag, Moskau 1986, p. 123

Uwe Werner

Nikola Aleksiev: Internacia Jaro de Paco. Sofio 1986. Bulgara Esperantista Asocio / Bulgara MEM-Komitato. 50 p.
La broŝuro entenas materialojn lige al la Internacia Jaro de la Paco, proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj por 1986. Ni trovas la programon de la Jaro, proskribon de la internacia situacio 1986, la planon „Gorbaĉov" pri la forigo de ĉiuj nukleaj armiloj ĝis la jaro 2000, informojn pri la reago de USONO al tiu plano, ĉapitron pri la kontraŭarmadaj aktivajoj de la lasta tempo (la honestaj homoj agadas) kaj ĉapitron pri la kontribuo de la esperantistaro al la pacbatalo. Diversaj dokumentoj finas la utilan broŝuron.

En blindulaj gazetoj de GDR 1986

En jenaj blindulaj gazetoj de GDR aperis dum la jaro 1986 informoj pri Esperanto, verkitaj de Ursula Heiden el Rostock:

— „Kulturpolitische Zeitschrift" 1/86 (pri okupiĝo de la verkintino kun Esperanto)
— „Gegenwart" 1/86 (kun anoncoj pri lernebleco de Esperanto)
— „Gegenwart" 4/86 (pri oferto fondi kasetan rondon por blindaj esperantistoj)
— „Gegenwart" 12/86 (pri somera Esperanto-kurso en Szombathely/Hungario)
— „Kultur und Freizeit" (kaseta revuo) januaro/86 pri Esperanto
— „Kultur und Freizeit" oktobro/86 (pri Esperanto-kurso en Szombathely, kun muzikaĵo).

Ni gratulas al s-ino Ursula Heiden pro la bonaj aktivecoj.

Sana vivmaniero

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco „Esperanto" organizas la internacian ekspozicion pri la agado por la sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas **ĉiulingvajn** tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, la angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi ĉion (plejeble baldaŭ) al:
International Friedship Club „Esperanto",
P. O. Box 76, 703 000 Samarkand, Uzbekistan USSR.
Al ĉiu helponto ni volante sendos laŭdezirajn memorajojn.
Daŭre validas. Represo kaj **nacilingvaj** anonctradukoj deziratai.

VIIIa Pacrenkontigo en Pardubice

Denove okazis la jam tradicia grava internacia pacrenkontiĝo de Ĉeha Esperanto-Asocio en Pardubice, ĉijare de 20. — 22. 3. 87, kiun partoprenis pli ol 200 esperantistoj el 9 landoj, inter ili pli ol 20 el GDR. La partoprenintoj akceptis jenan alvokon:

ALVOKO

Omaĝe de la 45-a datreveno de ekstermo de vilaĝo Ležáky far la germanaj nazioj renkontiĝis geesperantistoj el 9 landoj je la VIII-a pacrenkontiĝo en Pardubice.

Ili konstatis, ke kvankam ĉiu-jare plifortiĝis la kontraŭstaro de plimulto de enloĝantoj sur niu planedo kontraŭ militarismigo de la kosmo, danĝero de la nuklea holokaŭsto daŭre minacas la ekziston de la tuta homaro.

La danĝero senĉese kreskas pro evoluo de pli kaj pli inĝeniaj armiloj. Partoprenantoj de la renkontiĝo tial plene interkonsentas, ke ankaŭ en polnitikajn kaj internaciajn rilatojn oni devas enkonduki novan pensmanieron. Per devas enkonduki novan pensmanieron. Per traktado oni solvu la miskomprenojn inter la ŝtatoj, oni respektu la rajton de la homaro je vivo en paco, oni certigu ĝian daŭran materian kaj kulturan disvolviĝon.

Partoprenantoj de la renkontiĝo alvokas esperantistojn el ĉiuj kontinentoj, ke ili eluzu la lingvon Esperanto por aktivigi pacamajn fortojn en la tuta mondo, kunagadi kontraŭ la militarismigo de la kosmo kaj por sinsekva likvido de la nukleaj kaj aliaj armiloj de amasdetruo.

Kuntekste kun tiuj dezirespŕjmoj la partoprenantoj bonvenigas la lastajn sovetiajn iniciatojn je forigo de eŭroraketoj, por redukto de la nombro de ĉiuj raketo, je la sama nivelo por ekvilibro ambaŭflanke. Por haltigi la armadkonkuradon la mondo bezonas internacian moratorion pri kompleta ĉesigo de nukleaj eksplodprovoj.

La portoprenantoj de la renkontiĝo alvokas esperantistojn el ĉiuj landoj, ke ili ankaŭ dum la 72-a Universala Kongreso en VARSOVIO aktive ekstaru kontraŭ la militarismigo de la KOSMO.

Partoprenintoj de la
VIII-a pacrenkontiĝo
en PARDUBICE, la 21. 3. 1987

VIII-a Konferenco „Internacia Lingva Komunikado (ILK)"

Ĝi estas organizita fare de Studenta Scienca E-Rondo de la Lodza Universitato kune kun la Laborejo de Hindeŭropa Vortaro ĉe la Katedro de Klasika Filologio, en Lodzo dum 20. — 23. 11. 1986 sub honora protekto de la Pola INSTITUTO pri INTERNACIAJ AFEROJ.

La konferencon partoprenis 56 sciencistoj, specialistoj kaj studentoj (inter ili 19 referin-

toj, kiuj prezentis 25 referajojn kaj komunikajojn). Dum 20. — 21. 11. 86 estis prezentitaj laŭsekve jenaj referajoj:

1. doc. dr. T. Pobozniak: Problemoj de interlingvistiko
2. doc. dr. A. Manczyk: Kelkaj aspektoj de kundependeco inter ekkonprocezo kaj lingva komunikado
3. Antoni Golonka: Pri problemoj ligitaj kun kreado de Esperanta leksiko
4. doc. dr. W. M. Grabski: Kultur-politikaj kondiĉigoj de ILK kiel globala problemo
5. dr. T. Tyblewski: Modifoj de mondbildo kiel rezulto de interetna komunikado
6. dr. A. Szołtysek: Etnolingvo kaj lingvo universala
7. dr. S. Duczmal: Lingvistikaj kaj psikaj aspektoj de interkomunikiĝado
8. A. Golonka: Esperanta mitologio
9. dr. H. Prosnak: Koncepto de universala lingvo de W. Hlebnikova
10. mag. P. Stalmaszczyk: Multilingvismo kaj ILK
11. mag. W. Usakiewicz: Idiomoj en la lingvo Esperanto
12. A. Golonka: Lingvistikaj laborajoj de Alojzy Borys
13. A. Lewkowicz: Problemo elekti aŭtoritaton en la procezo de enkondukado en la vivon de rezultoj de konscia influado cele al la disvolvo de la lingvo de romoj.

Dum la 2. — 23. 11. enkadre de la konferenco okazis hindoeŭropistika sesio, kiun plenumis jenaj referintoj:

1. doc. dr. T. Pobodzniak: Loko de la hindiranaj lingvoj enkadre de la hindeŭropa familio
2. doc. dr. I. R. Danka: Poeziajo de la polaj malaltaĵaj ciganoj
3. T. Roszak: Hindeŭropaj prepozicioj en koncepto de la jungramatikistoj
4. mag. P. Stalmaszczyk: Lingvo de Man-insulo
5. mag. K. Witczak: Problemo de lingvaj kontaktoj surbaze de mara leksiko de germanoj
6. doc. dr. I. Sawicka: Problemo de deveno kaj lulilo de la albana lingvo
7. K. Dziedzic: Sol-hindeŭropaj kaj fremdaj elementoj en la sunkulto de romanoj
8. dr. R. Wroblewski: Lingvaj rilatoj en Eŭropo dum la XVI-a jarcento
9. A. Lewkowicz: Disvastiĝo de la ciganaj homgrupoj
10. dr. T. Ejsmont: Programaj premisoj de la konferencoj ILK
11. dr. J. Zyczynski: Klasifiko de la hindaj lingvoj
12. doc. dr. I. R. Danka: Historio de la hindeúropistika leksikografio (ĝis la jaro 1912)

La sciencan programon vespere akompanis riĉa kultur-arta programo. La konferencanoj ricevis jenajn presitajn konferenc-materialojn:

1. Internacia Lingva Komunikado, Konferencaj maetrialoj — V, red. T. Ejsmont, Lodza Universitato, Lodzo 1986, p. 165 (9 kontribuaĵoj), eldonkvanto — 500 + 50.
2. Międzynarodowa Komunikacja Językowa (Internacia lingva Komunikado, Materiały konferencyjne / Konferencaj materialoj — VI, red. T. Ejsmont, Lodza Universitato, Lodzo 1986, p. 239, 20 kontribuaĵoj — 450 + 50.

La konferencon partoprenis redaktoro Jerzy Uspienski el Esperanto-Redakcio de la Pola Radio, kiu preparis por esperantistaj radio-aŭskultantoj 4 dekkvinminutajn disaŭdigojn. Oni decidis, ke la IX-a konferenco ILK okazos dum la 19 — 22. 11. 87 en Lodzo, kaj enhavos jenan problemaron:

a) histori-kompara analizo de la fenomenoj kaj procezoj de ILK
b) socilingvistiko-psikolingvistikaj aspektoj
c) 100 jaroj de ekzisto kaj disvolvo de Esperanto — pritaksoj kaj prognozoj.

Pli detalaj informoj ĉe la raportinto/PL-92-547 Łodz, Bartoka 1/49/.

Tadeusz Ejsmont

Gaŭ Šiĉji: Aŭtobiografio de bakterio. Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino 1986, 108 p., 18 cm, 3.90 Gld.

Biotekniko apartenas al la plej aktualaj studobjektoj en ĉiuj evoluintaj industrieŝtatoj. Forte kreskas la intereso pri la mirinda potenco de mikroorganismoj, kiuj ludas simile ŝlosilan rolon por la necesa plua kreskado de la ekonomio kiel la mikroelektroniko. Ankaŭ la biotekniko estas afero de malmultaj specialistoj. Sed esperantistoj havas la bonŝancon akiri abundajn informojn el tiu-ĉi sciencpopulariga ĉina broŝuro, kiu estas unika inter la faklibroj.

Babilas bakterio. Ĝi prezentas sin mem kaj sion grandan familion. Ili sopiras al agrablaj vivokondiĉoj, ne malofte eĉ poeme:

„La homa ventro, eden' en vero
Sen frost', malsat' kaj sekiĝdanĝero,
senfine riĉas je gras', sukero."

Preskaŭ kun kompato oni legas pri la malkaŝo de ilia milionjara familia sekreto post teruraj proceduroj en laboratoria vitra „pagodeto". Scivoleme oni sekvas aventurajn vojaĝojn tra sango, pulmoj, manmpintoj aŭ intestoj de homa korpo.

La bakterio peras „personajn impresojn" el la historio de la bakteriologio kaj pentras buntan panoramon de siaj taskoj kaj servoj en nekredeble multaj procedoj en akvo, grundo, aero kaj en ĉiuj vivuloj, ĉu planto, besto aŭ homo. Ĝi konfidas al la leganto sian fi-agadon okaze de famaj higienaj katastrofoj sed ankaŭ sian utilon por la homa nutrado kaj agrokulturo. Eĉ bieron ni malhavus sen ĝia diligenta laboro!

La aŭtoro, Gaŭ Šiĉji (nask. 1905) studis en Usono kemion kaj bakteriologion. 23-aĝa dum esploroj li kripliĝis pro encefalitaj virusoj kaj dum tuta vivo li daŭre laboris, esploris la nutraĵan sciencon, fariĝis talenta aŭtoro de multaj sciencaj kaj popularsciencaj eseoj, poemoj kaj libroj. En 1979 oni elektis lin honora prezidanto de la ĉina Asocio de Sciencpopularigaj Verkistoj.

La tradukinton de tiu-ĉi libro (verk. 1936) oni ne indikis. La lingvaĵo estas iomete nekutima, foje fabele-naiva, sed la enhavo kaptas la intereson kvazaŭ krimromane. La recenzinto simple ne emis interrompi la legadon por substreki malglataĵojn. Kvazaŭ lude prezentiĝas krome riĉa naturscienca terminologio.

Finleginte la libron certe multaj ĝoje konstatos „Fine mi komprenas la mondon de la mikroboj."

Linde Knöschke

ČSSR

Komencanto, 35., dez. kor. kun germanaj esp. p. ĉ. t., kol. bk, kalendarojn: Ing. Štefan Makovický, Zápotockého ul. ĉ. 5, **974 01 Banská Bystrica**

GDR

Maŝinisto, 51j., dez. kor. tutmonde pri fotografio, literaturo: Werner Tieke, Otto-Rothe-Str. 4/174, **Gera-Lusan 6502**

Inĝeniero, 43j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: M. Klabunde, Fontanestr. 60, **Hennigsdorf 1422**

Hungario

Instruistino, 29j., dez. kor.: Edit Egri, **4033 Debrecen,** Bányai I. u. 14

Pollando

21j. studentino dez. kor. tutmonde pri literaturo, sporto, lingvo:
Anita Szczygielska, ul. Bydgoska 23 B/6, **10-243 Olsztyn**

Gała Arkadiusz, **58-420 Lubawka,** str. Kosciuski 4/3, 25j., dez. kor. tutmonde pri turismo, folkloro, kol. pm, bk

Wanda Niemiecka, Gerbów 917, **39-410 Grebów,** woj. Tarnobrzeg, 21j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, folkloro, lingvolernado, kol. pm, librojn

Bronislaw Fras, ul. Jasminowa 27d-48, **32-511 Jaworzno,** 33j., dez. kor. kun germanaj esp. pri lingvoj, literaturo, geografio, vojaĝoj, kol. esperantajojn

Komencanto, 18j., dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo, libroj: Ryszard Balicki, Grochovice 24, **67-240 Kotla**

Zenon Kalinowski, ul. Piaskowa 32, **18-400 Łomza 4,** dez. kor. pri naturo, ĉiutaga vivo, historio

25j. komencanto dez. kor. tutmonde pri turismo ,sporto, fotoarto, kol. bk, turismajn prospektojn: Marek Ciupek,**38-311 Szymbark 373,** woj. Nowy Sacz

Stanislaw Zalewski, **43-322 Czechowice-Dziedzice,** ul. Traugutta 24/101, 34j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Komencantino, 36j., dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, filmoj, kol. pm, bk: Malgorzata Paweiczyk, **42-653 Pickanj SL 9,** str. Oświecimka 176/12

Oficisto, 24j., dez. kor. tutmonde pri turismo, fotografado, kol. bk, turismajn prospektojn: Sławomir Szymala, skr. poczt. 486; **42-217 Czestochowa 17**

Władysław Stasiow, P. O. Kesto 518, **30-960 Krakow,** 48j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk, diskojn, katalogojn, esperantajojn

E-familio: Henryk Kosiński, 56j., Maria Kosińska 39j., Wojciech Kosiński, 14j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Adreso: **41-800 Zabrze,** ul. de Gaullea 122/9

Rumanjo

36j. geografo dez. kor. kun geesp. el GDR p. ĉ. t.: Ioan Haraga, Micro 3, bloc A3, ap. 38, **5100 Buzău**

Svedio

Verkistino, komencantino en E, dez. kor. tutmonde pri literaturo, arto, folkloro: Anna Lorentz, Malmgatan 5, **331 00 Värnamo**

Soveta Unio

Instruistino kaj 35 gelernantoj (9 — 16j.) dez. kor. komune kaj individuale: Anja Vojnarovič, Esperanto-Klubo „L. L. Zamenhof", **343 871 Avdeevka-5,** Doneckoj obl., abonkesto 120

21j. medicinisto dez. kor. pri lingvoj, literaturo, muziko, Sergej Derevjannih, **450 055 Ufa,** prosp. Oktjabrja 176/1 — 145

Konstruinĝeniero, 48j., dez. kor. kol. bk kun popolkostumoj, arkitekturajoj: Vladimir Majboroda, 2 naber. reki 21, **244000 Sumi**

72j. pensiulo dez. kor. kun dresdenanoj: Aleksandr Ş. Nagornij, ul. Sivaĉenko, 72-8, doneckoj obl., **343740 Torez-11**

Antanas Mekys, **232000 Vilnius/Litovio,** pp. k. 149, dez. kor. pri instrumetodoj de Esperanto, interŝanĝi spertojn kun kursgvidantoj

Anoj de Interklubo „Esperanto", **229700 Latvia SSR,** Liepaja Rigas str. 50, 5. vidusskola, dez. starigi kontaktojn kun gejunuloj tutmonde, kun lernejoj, kluboj de Internacia amikeco, kol. pm, bk, turismajn prospektojn en naciaj lingvoj kaj E-o, interesajn materialojn pri la popoloj de la mondo

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Otto-Nuschke-Str. 1
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16